

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 6 (73) decembro 2012



***Dankon,
Saŝa!***

en la numero

*20-jariĝo de
“Impeto”*

*rakontoj pri
TILE-7, MLF-7,
Zamenhof-tagoj en
Jekaterinburg kaj
Sankt-Peterburg*

*salato por
Zamenhof en
Uljanovsk*

*nova disko de
Mikaelo Bronŝtejn
versaĵoj de*

*Rustam Karapetjan
kaj Klara Ilutoviĉ*

*nova traduko el
Vitalij Bianki*

*forpasis
Aleksandr Ŝevĉenko
kaj Aleksandr Titajev*

*“Bulteno de REU”,
novaĵoj kaj multo
alia*

Moskvo, 2012

enhavo

- 01 Notinda jubileo
- 05 TILE-7
- 07 Zamenhof-festo en Jekaterinburg
- 08 Zamenhof-tago en Sankt-Peterburg
- 09 E-programo en la Lingva Festivalo
- 10 Lingva festivalo (versaĵo de K.Ĥutoviĉ)
- 11 Salato por Zamenhof
- 12 Uljanovska E-vivo dum draka jaro
- 15 Prefikse uzataj E-vortoj (parto 3)
- 26 Li estis la unua
- 28 Suno, maro, koncertoj kaj nokta vivo
- 29 La doloraj forpasoj
- 29 Elekto de komitatanoj B por 2013-2016
- 29 Nova dumviva membro de REU
- 30 Nombrado de esperantistoj fiaskis
- 30 Veteranoj en Facebook
- 30 REU-kotizoj por 2013
- 31 Pagmanieroj
- 32 Aleksandr Borisoviĉ Ŝevĉenko
- 32 Aleksandr Borisoviĉ Titajev
- 33 Poŝtmarko pri la Unua Libro
- 33 Movada kaj literatura Malferma tago
- 34 La Rejkjavika UK diskutos pri justa komunikado
- 35 UEA intervenis en Esperanto ĉe UN
- 36 Pri Esperanto en la NRO-Packomitato
- 37 Esperanto-ponto en Bydgoszcz
- 37 Lingva Festivalo en Odeso
- 38 UEA en NRO-Konferenco de Unesko
- 39 Forpasis Laŭlum
- 40 Forpasis Dao Anh Kha
- 40 La 7-a Azia Kongreso de Esperanto
- 40 La 46-a Konferenco de ILEI
- 41 Libroj de "Impeto" favorpreze proksime de Kremlo
- 41 Esperantlingva bondeziro de la Papo
- 42 Belartaj Konkursoj de UEA en 2013
- 42 Novaj muzikdiskoj
- 44 Rezultoj de la konkurso "Verda Plumo"
- 45 Al la verkisto dediĉita... Ivan Gonĉarov
- 46 Al la verkisto dediĉita... Vinnovka
- 47 V.Bianki. Kiel formiketo hejmen rapidis (tradukis L.Kuzmenko)
- 51 Versaĵoj de Rustam Karapetjan
- 51 Rezultoj de la konkurso "Hristo Gorov"
- 52 Boris Natanoviĉ Strugackij
- k3 Antaŭ la Novjaro (versaĵo de K.Ĥutoviĉ)
- k4 Amuzaj misskriboj kaj eraroj
- k4 Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj!



**Ne forgesu
(re)aboni REGon**

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 6 (73) decembro 2012

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

*materialoj de REGo povas esti
 represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos
 senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*
 poŝta adreso: Pjatinickoje ŝosse 45 – 105
 125310 Moskvo, Rusio
 retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2013:

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj
 de KŜŜ – 500 rubloj, sendendaj al:*
 Коколия Георгий Владимирович
 Пятницкое шоссе 45 – 105
 125310 Москва

*aŭ pagendaj al: 410011382499386
 en la pagsistemo "Яндекс.Деньги"*

*por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj
 pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

elektronika abono – 200 rub. (5 eŭroj)

Ĉi-suba artikolo estis verkita por la oktobra numero, sed pro diversaj kaŭzoj la publikigo estis prokrastita. Intertempe, la 18-an de novembro la amikaro de “Impeto” solene festis la 20-jariĝon de la eldonejo. Precize post unu semajno min bategis terura kaj ŝoke doloriga informo pri la subita forpaso de Aleksandr Ŝevĉenko, la ĉefredaktoro de “Impeto”. Certe tio postulas neniujn ŝanĝojn en la artikolo, krom... krom la lasta alineo. Ve, Aleksandr ne sukcesos realigi la revojn, pri kiuj mi skribis kun sincera certeco, ke neniaj plagoj povas tuŝi miajn amikojn. Nin elsarkas forbeke l’ tempobird’ – Saŝa trafis sub ties bekon.

Tamen mi ŝatus ŝangi nenion en la artikolo. Unue, ĉar la vortoj estis skribitaj, kiam la homo estis viva. Due, ĉar restas Dima Ŝevĉenko, kiu ricevu herede anstataŭ la patro miajn bondezirojn por “Impeto”. Ja nun ĝi estas lia afero.

M.B.

Notinda jubileo

1. Prahistorio

Se mi bone fosu en mia memoro, mi konatiĝis kun gesinoroj Jelena kaj Aleksandr Ŝevĉenko antaŭ ĉ. tridek jaroj – kun ĉiu el ili aparte – ĉar tiam ili estis ankoraŭ ne geedza paro, sed jam esperantistoj. En tiu fora tempo Jelena estis studentino de prestiĝa ĵurnalisma fakultato de Moskva Ŝtata Universitato; tiaman okupon de Aleksandr mi ne



memorfiksis. Ambaŭ ili diversmaniere aktivis en la brua vivo de soveta E-junularo, la vivo, kiun ne sukcesis estingi eĉ la malfondo de SEJM, sekvinta la fondon de absolute burokrata ASE. Memoro estas selektema, do la mia konservis el tiu tempo nur ĉeeston de Jelena en 1983 dum la defendo de kandidata disertacio de Dina Lukjanec en la Instituto de Lingvoscienco, ankaŭ ŝian fundamentan kaj tre ridindan esploron pri esperanto-slango en Sovetio, rave aplaŭdatan ĉe ĉiu prezento.

Sed vera konatiĝo, amikiĝo kaj unua traktado pri ontaj eldonaferoj okazis en 1988. Tiam mi estis oficanta en la plej fora eŭropa nordo de la lando, en unu el la karbominejoj de Vorkuta. Certe, neniu el miaj esperanto-amikoj vizitis min tie dum mia dekjara oficado. Neniu krom la junaj geedzoj, Jelena kaj Aleksandr, kiuj kuraĝis atingi mian loĝlokon vintre, ne sen embarasaj travivaĵoj, inkluzive tagnoktan ekzilon en la trajno, kiun haltigis terura blizardo mezvoje. Poste, en mia norda hejmo ĉe teumado, ili entuziasme rakontis al mi pri siaj planoj ambiciaj, kiuj ekhavis

eblecon realiĝi pro la nova situacio en la ŝtato: pri aperigo de varienhava almanako en esperanto (la nomo por tiu jam estis preparita – “Impeto”), pri esperantlingva periodaĵo, kaj pinte – pri fondo de esperanto-eldonejo!

Spertinta kelkjardekan kontraŭstaron de la fifama landa cenzuro “Glavlit” ĉe ĉiu mia provo aperi eĉ la plej etan artikolon pri Esperanto, mi aŭskultis ĝentile, sed sen plena fido. Estis la vivo, kiu instruis min pridubi la eblecon de tiom ŝoke abrupta trarompo de la cenzura murego, ekzistanta kaj fortiĝanta dum pli ol duon-jarcento. Tamen mi volonte akceptis, ke en la unua almanako aperu mia traduko el Puŝkin (“Graf” Nulin”, kiun mi, cetere, tradukis ankoraŭ en 1979 sen espero iam eldoni), prenis la taskon traduki por la dua almanako ion el Boris Pasternak kaj iom fanfaronetis pri la verkata romano, duonŝerce aludinte eventualan aperigon de tiu far la fondota eldonejo. Bela revo, mi diris...

Malgraŭ miaj duboj ĉio ekevoluis laŭplane ĉe la ŝtata eldonejo “Progress”, kie Aleksandr enoficiĝis en 1989 kiel estro de unu el la tiamaj redakcioj. Almenaŭ mia puŝkinaĵo aperis en la almanako “Impeto-89” tute ĝisdate por omaĝi al la 190-jara jubileo de la granda poeto. La unuan almanakon sekvis la dua – “Impeto-91”, nature enhavanta inter alio da interesaj ankaŭ mian tradukon el Pasternak.

Tiutempe mi adiaŭis la Nordon, do akiris pli palpeblan tempon por miaj literaturaj okupoj.

2. La dudek jaroj

Vidu, fakte do la eldona agado de pra-“Impeto” ekis jam en 1989. Sed oficiale fondo de la eldonejo okazis en 1992. Sekve nur hodiaŭ venas natura bezono paroli pri la dudekjara jubileo de la Esperanto-eldonejo, aganta (mi speciale emfazu tion) ĉefe por la internaj bezonoj de la grandega Rusia Federacio.

En la jaro 1991 Sovetunio kolapsis kiel ŝtatmaŝino. Iom poste pro diversaj, sed ĉefe ekonomiaj kaŭzoj disfalis ankaŭ la grandiozaj informaj entreprenoj, servantaj por la kolapsinto kaj bredataj de tiu. Estas senduba merito de Aleksandr Ŝevĉenko, ke inter la aro de eldonejoj, ekagintaj sur la ruinoj de la giganta “Progress”, ekĝermis ankaŭ la esperanto-eldonejo “Impeto”, simbole komencinta sian agadon per reprints eldono de la

Eldonejo Impeto

1992–2012

Dum 20 jaroj la eldonejo organizis pli ol 100 prezentaĵojn

Niaj aŭtoroj
(67 nomoj el 14 landoj)

Niaj libroj
(136 titoloj)

impeto.truvu.com

Unua Libro de Zamenhof. Ĝin sekvis dum la unua agadjaro 1992 kvar pliaj libroj en esperanto kun suma paĝokvanto 356 – ne malbona por la komenco. Mi speciale fieras, ke inter tiuj kvar estis ankaŭ mia unua libreto. Ne la promesita romano (ĝi aperis en 1993), sed naskita dank’ al brila propono de Jelena Ŝevĉenko aro da rakontoj “Legendoj pri SEJM”, varme akceptita de la esperantista legantaro kaj poste reeldonita ankoraŭ dufoje (1998 kaj 2006). Pli ol cento da partoprenintoj de REU-Kongreso en Sankt-Peterburg (1992) eble memoras la batalon de “Impeto” kontraŭ tiama tendenco profitcele vendi la librojn unuavice kaj plejparte en eksterlando. Restas do en mia biblioteko, kiel memoraĵo tiuepoka, ekzemplero de la “Legendoj” kun speciala stampo “Vendata nur en la rubla zono”...

La juna eldonejo havis ambicie variajn planojn, evoluantajn pli-malpli sukcese de jaro al jaro. Tradicie “Impeto” estas preskaŭ ĉiujara eldonisto de la Jarlibro de Rusia Esperantista Unio. Dum la du jardekoj aperis necesa areto de primovadaj verkoj en la rusa kaj en esperanto – i.a. “La danĝera lingvo” de Ulrich Lins. Ne mankis lernolibroj, legolibroj por komencantoj, vortaroj. Kun certa atento al la klasika rusa beleto (ekz. “Elektitaj verkoj” de Aleksandr Puŝkin – la volumo dediĉita al la 200-jara jubileo de l’ poeto) “Impeto” tamen donis avantaĝon al nuntempaj aŭtoroj esperantaj kaj rusaj, altmeritaj kaj komencantaj, prenante la riskon eldoni tion, kio, laŭ opinio de la redaktoroj, estas legiloga, do bone vendata. Cetere, bone vendataj kaj legataj povas esti ankaŭ poeziaĵoj, kiujn la eldonejoj kutime enplanigas malvolonte. Impetanoj kuraĝis eldoni dek originalajn poem-kolektojn de modernaj espoetoj, malkovrinte por poeziŝatantoj la nomojn de Grigorij Arosev, Oĉjo Dadaev, Klara Ilutoviĉ, Ivan Naumov. Estas publikigita eĉ antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj “Moskvaj sonoriloj”, prezentanta 36 nomojn!

Traktado kun altmeritaj aŭtoroj ĉiam estas komplika tasko, do la eldonejo rajtas fieri, ke tiuj pozitive aprecas proponatajn kontraktojn pri esperantigo de iliaj verkoj kaj publikigo eĉ “Impeto”. En 1995 estis subskribita la kontrakto pri esperantigo kaj eldono de dek kvar romanoj de la plej famaj sovetiaj/rusiaj sciencfikciaj verkistoj Arkadij kaj Boris Strugackij. La naŭ, aperintaj ĝis nun, trovis sian dankeman legantaron; ilin surbretigas grandaj librovendejoj en Moskvo, Peterburgo kaj aliaj rusiaj grandurboj, ĉar SF-ŝatantoj, eĉ sen posedo de la lingvo, emas aĉeti la librojn por siaj kolektoj. Versimile, la saman sorton spertos tri libroj de “La nokta patrolo”, fikcia historio grandsukcese surekranigita en Rusio. Sergej Lukjanenko, la aŭtoro, ĉu ne la plej legata el inter modernaj rusaj fikciverkistoj, kun plezuro permesis aperigon de siaj verkoj en esperanto.

3. Planoj, revoj, perspektivoj

Konstanta evoluo kaj akumulo de eldonsperto pli kaj pli altigas la kvaliton de “Impeto”-produktaĵoj. Zorgoj pri altnivela redaktado, pri la papero kaj tiparoj, traktado pri kovrilpaĝoj kaj ilustraĵoj kun majstraj desegnistoj, multaj aliaj aferoj, inkluzive la neeviteblan librotrenadon, okupas plene la tempon de la eldonistoj Jelena kaj Aleksandr Ŝevĉenko. Konstante helpas ilin ankaŭ la filo Dmitrij, denaska esperantisto, nuntempe aspiranto kaj instruisto de la ĵurnalisma fako eĉ la

filologia fakultato de RUDN (Rusia Universitato de Amikeco inter Popoloj)).

Kutime oni kalkulas paĝaron, produktitan de la eldonejo – ankaŭ mi faru tion. Do dum la jaroj 1992-2012 “Impeto” produktis entute 257 librojn; inter ili 136 – en aŭ pri esperanto, sume 20184 paĝojn aŭ, averaĝe, pli ol mil paĝojn ĉiujare. Nemalbona rezulto. Kien plu?

Certe, antaŭen. La planoj de “Impeto” daŭre restas optimismaj kaj ambiciaj, ne malpli ol ĉe la naskiĝo de la eldonejo.

Kvazaŭ responde al la antaŭnelonga arda diskuto pri enkonduko de esperanto en la programon de rusiaj lernejoj, proksimtempe aperos esperanto-lernolibro por infanoj. Kompleta elĉerpiĝo kaŭzas baldaŭan reeldonon de la vortaroj rusa-esperanta kaj esperanta-rusa. Aperis jam la tria eldonkvanto de la fama lernilo de Boris Kolker.

Certe, venos al la legantaro pliaj romanoj de la fratoj Strugackij, konfirmitaj per la kontrakto. Ankaŭ Sergej Lukjanenko, la aŭtoro de “La nokta patrolo”, “Kavaliroj de kvardek insuloj”, “La knabo kaj mallumo”, jam eldonitaj de “Impeto”, malavare donas oficialan permeson por esperantigo kaj eldono de aliaj atentokaptaj fikciaj romanoj. La traduka laboro postulos ne nur sperton, sed ankaŭ multan tempon, do ne mi, solulo, havanta ankaŭ proprajn verkoplanojn, faros tion. La eldonejo proponis kunlaboron al du fortaj tradukistaj grupoj: tiu de Moskva Esperanto-Centro, kiu jam faris la tradukon de “La nokta patrolo”, kaj la alia – tiu de Esperanto-klubo en Tihvin. Poste venis freŝa ideo – aperigi elstarajn originalajn verkojn de esperanto-literaturo, tradukitajn en la rusan. Jen nova libroserio, titolita “Волна эсперанто” (La Ondo de Esperanto), kiun komencis mia romano “Dek tagoj de kaptano Postnikov”, tradukita de Anatolij Radajev el Samara. Sekvis la fama “Metropoliteno” de V.Varankin, poste...



“Волна эсперанто” (La Ondo de Esperanto), kiun komencis mia romano “Dek tagoj de kaptano Postnikov”, tradukita de Anatolij Radajev el Samara. Sekvis la fama “Metropoliteno” de V.Varankin, poste...

Poste ni venas jam en la sferon de revoj – ankaŭ tiuj multas, kaj mi, havanta senperan rilaton al “Impeto” almenaŭ kiel aŭtoro pli-malpli konstanta kaj fidela, emas sincere deziri efektivigon de ĉiuj revoj de la eldonistoj. Indas kredi, ke la ĝenerala direktoro Aleksandr Ŝevĉenko, kiu septembre festis 55-jariĝon, kaj la respondeca redaktoro Jelena Ŝevĉenko, jubileinta novembre (miajn gratulojn!), disponas pri sufiĉaj forto, sano kaj idearo por ankoraŭ dum multaj jaroj ĝojigi espajn legantojn per novaj frandindaj libroj.

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin)

Jam sepan fojon la E-klubo “Laro” invitis al Soĉi sud-rusiajn esperantistojn por sia aŭtuna aranĝo – TILE (Tagoj de Internacia lingvo Esperanto). Venis 31 personoj el 12 lokoj de nia vasta lando: de Tomsko kaj Uralo ĝis Kislovodsko. Okazis multaj interesaj prelegoj kaj prezentoj:

- Galina Belenjuk rakontis pri partopreno en Universala E-kongreso en Vjetnamio kaj montris belajn foto-albumojn;
- Marina Kocarj (Krasnodar) detale rakontis pri Itala E-kongreso en Sicilio, ilustrante sian rakonton per fotoj el komputilo;
- Nina Omelĉenko (Novoĉerkassk) prezentis sian vojaĝon tra Siberio kaj Mongolio;
- Anatolo Masenko (Kislovodsk) rakontis pri Blindula E-kongreso en Ukrainio;
- Vladimir Bespalov parolis pri SAT-Kongreso en Jalto (Krimeo).

Blindula grupo (Kislovodsk, Armavir, Soĉi) plenumis multajn kantojn en Esperanto kaj ricevis aplaŭdojn. Marina Kocarj kaj Vladimir Derevjanko plenumis la kanton “Bela Soĉi”, komponitan far Derevjanko. Okazis ekskursoj tra la urbo kaj al Abĥazio, vizito al la Arbo de Amikeco.

Vladimir Minin (Tomsk) organizis konkurson de interpretistoj. Vladimir Bespalov informis pri Esperantistaj radiostacioj, inter kiuj “Muzaiko” dissendas tutdiurne, kaj instigis la partoprenantojn pririĉigi E-kunvenojn per komuna aŭskultado de la radiostacioj. Grupo el Uljanovsk, gvidata de Margarita Karceva, prezentis filmon pri sia urbo kaj donacis E-kalendaretojn por la nova jaro, produktitajn tie. Ĉiu partoprenanto ricevis donace la rusa-Esperantan Vortaron de Bokarjov kaj la unuan lernolibron de Esperanto.



Vladimir Bespalov (Soĉi)

Ĉu vi volas daŭrigi la someron? Tiam partoprenu TILE-8!

Ĉiuj, kiuj partoprenis TILE-aranĝon ĉi-jare, estas konvinkitaj pri tio. Kaj partoprenis tiun renkontiĝon pli ol 30 spertuloj, daŭrigantoj, komencantoj kaj eĉ kelkaj “krokodiloj”. Multaj enhavriĉaj rakontoj, ses interesaj ekskursoj, gastamaj E-soĉianoj – ĉio ĝojigis la korojn de la partoprenantoj. Geografie estis prezentataj 12 urboj: Armavir, Ĉeljabinsk, Gelnĝik, Dimitrovgrad, Kislovodsk, Krasnodar,

Nevinnomissk, Novoĉerkassk, Soĉi, Taganrog, Tomsk, Uljanovsk. Evidentiĝis, ke la plej grandaj teamoj estis el Soĉi (6) kaj Uljanovsk (5). El Ĉeljabinsk, Tomsk, Nevinnomissk kaj Gelenĝik alvenis po 1 persono, el Kislovodsk, Taganrog kaj Dimitrovgrad – po 2, el Armavir, Krasnodar kaj Novoĉerkassk – po 3.

La vetero estis bonega: hela suno, blua ĉielo, varma maro... Ili invitis nin ĝui diversajn ekskursojn: tradician promenon tra la parko “Rivjera”, kie ni povis viziti antaŭnelonge malfermitan delfenejon kaj eĉ tuŝi kaj karesi afablajn delfen-aktorojn; ekskurson al Abĥazio (9 personoj); al vilao de I.Stalin en Macesta (8), al Voroncov-kavernoj (5), al Dendrario (7) kaj certe al la Arbo de Amikeco kaj apuda muzeo. Al la uljanovska teamo tre plaĉis ĉiuj ekskursoj. Ĝi ne vojaĝis nur al Abĥazio, ĉar duono jam estis tie antaŭe dum TILE-6.

Kaj Esperanto, la ĉefa kialo de la renkontiĝo? Jes! Certe! 14 lecionoj laŭ libreto de kaj kun Vladimir Bepalov por junaj komencantoj, interesaj rakontoj de Galina Belenjuk pri UK en Vjetnamio, de A.Masenko pri kongreso de blinduloj apud Kievo, de V.Bepalov pri SAT-kongreso en Krimeo, pri vojaĝo al Italio (M.Kocarj), pri ANERO de V.Rassohin, pri eblecoj de Skajpo (V.Goldobina) okazis en la programo de la renkontiĝo. Gennadij Mitrofanov informis pri historia komenco de Esperanto-agado en Taganrog. Ankaŭ komputila esperantlingva prezento de kluba agado en Uljanovsk estis montrata. Kaj tradiciaj E-domeno-ludoj de Anatolo Ivasenko kaj Tatjana Ilutkina interesis junajn kaj nejunajn ludintojn.

La unuan fojon estis organizata (V.Minin) konkurso de tradukistoj, kiun gajnis la ĉeforganizanto de TILE-7 Vladimir Bepalov.

Iomete mankis muziko. Tamen dum la malfermo sonis brila vira voĉtriopo de nevidantoj. Vladimir Derevjanko memorigis al ni la kanton “Bela urbo”. Tiun kanton, ĝian kreinton kaj lian gastaman edzinon Nadeĵda ne forgesis la uljanovskanoj. Marinjo flutludadis eĉ dum ekskursoj... Sed ĉiuj tre bedaŭris, ke ne eblis aŭskulti



gitaran muzikon de Alekseo Borodin, kiu pro diversaj kialoj for-estis, sed salutis nian kunvenon per mesaĝo.

Do, memoroj estas, rememoroj restos. Laŭ nia opinio, ĝis la sekva TILE-renkontiĝo.

Margarita Karceva (Uljanovsk)

ZAMENHOF-FESTO EN JEKATERINBURG

– AMASA KAJ SUKCESA!

La 15-an de decembro 2012 en la urala ĉefurbo Jekaterinburg sukcese pasis la tradicia Zamenhof-festo, ligita kun la 125-jara jubileo de la internacia lingvo.

La aranĝo okazis en jam tradicia loko – konferenca salono de la hotelo “Boļŝoj Ural”. Menciindas, ke la direktorino de la hotelo, kiu estas eks-esperantistino, afable disponigas al ni tiun ĉi salanon en la centra prestiĝa loko de la urbo.

La programo de la aranĝo estis tre riĉa kaj diversflanka:

- lingva rolludo por komencantoj kaj kursfinintoj, farita de Vladimir Opletajev;
- trarigardo de la jubileaj /125-jariĝaj/ iniciatoj tra la mondo;
- solena enmanigo de diplomoj al ekzamenitoj de la KER-ekzameno (21 personoj);
- enmanigo de la premio al la gajninto en la gramatika kvizo por komencantoj;
- akcepto de novaj adeptoj en la rondon de la esperantistoj;
- revua prezento de la junulara E-movado en Leipzig (Germanio) – Andre Mueller, nia gasto el Germanio;
- prezento de la informa broŝuro pri Esperanto, iniciatita de I&E kaj ILEI en la rusa lingvo “Malfermu por vi allogan mondon de Esperanto” (kunordiganto de la ruslingva projekto – Aleksandr Osincev);
- prezentado de E-libroj (A.Osincev);
- amika koncerto kaj amuza programo kun artaj, muzikaj, poeziaj programeroj;
- distraj amasaj ludoj, iniciatitaj de Roman Jefremov el Glazov kaj aliaj;
- tostado, teumado, amikaj konversacioj;
- komuna fotado, adiaŭo, disveturo.

La statistiko de ĉi-jara Zamenhof-festo-2012 en Jekaterinburg ĝojigas la okulojn: Jekaterinburg – 26; Glazov (Udmurtio) – 9; Tjumenio – 4; Ĉeljabinsk – 3; Revda – 3; Niĵnij Tagil – 2; Ĉusovoj – 1; Surgut – 1; Leipzig (Germanio) – 1. Entute la aranĝon partoprenis precize 50 esperantistoj el 9 urboj de 7 rusiaj regionoj kaj 1 eksterlandano. Ni dankas al ĉiuj aliurbaj partoprenintoj de nia komuna Z-

festo 2012 kaj deziras al ĉiuj sukcesojn en la nova agadjararo!

Vidu kelkajn fotojn ĉe:

<<http://www.facebook.com/media/set/?set=a.415228988545719.92197.100001758648704&type=1>>.

Viktor Kudrjavcev
(Jekaternburg)



ZAMENHOF-TAGO EN SANKT- PETERBURG

Saluton al ĉiuj esperantistoj! Kiel vi scias (mi esperas tiel), la 15-an de decembro ni festis, verŝajne, la ĉefan daton por ĉiuj esperantistoj de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj jarcentoj (dum Esperanto ekzistas, certe). Kompreneble, tio estis la naskiĝtago de la fondinto de nia amata internacia lingvo por ĉiu kaj por ĉiam – Ludoviko Lazaro Zamenhofo, kiu naskiĝis la 15-an de decembro 1859. Do, ni invitas vin rigardi diversajn “fotorememorojn” pri nia festado de la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhofo en Sankt-Peterburg kun la klubanoj de la plej granda kaj merita loka Esperanta societo, kiu estas nomita “Espero”. Tiu festo estis organizita en la hispana restoracio “Don Pepe” en la centro de nia urbo. La ĉefa gasto de nia festo estis denove Mikaelo Bronŝtejn, kiu estas unu el la plej popularaj kaj talentaj lokaj esperantistaj aŭtoroj, tradukistoj, bardoj, kantistoj kaj komponistoj samtempe. Dum la festo ni estis feliĉegaj interparoli, komunikiĝi kun Mikaelo denove, – kaj, certe, estis tre granda plezuro por ni aŭdi kaj kanti kun li diversajn popularajn kantojn en Esperanto. Krome, dum tiu festo ni havis ankaŭ bonan eblecon finfine renkontiĝi kaj komunikiĝi denove kun Anna Butkeviĉ, kiu estas la prezidanto de nia Esperanta societo “Espero”, kaj kun Boris Kondratjev, kiun ni scias ĉefe kiel la kompilinton de la modernaj grandaj Esperanta-rusa kaj rusa-Esperanta vortaroj. Mi esperas, ke ĉi tiuj fotoj povos montri al vi la suprenomitajn meritajn esperantistojn kaj kelke da aliaj lokaj esperantistoj, kiuj partoprenis tiun ĝojan feston. Do, ni deziras al vi ĝui tre-tre multe, kiam vi rigardos tiujn fotojn. Feliĉegan Zamenhofan tagon al ĉiuj! Estu feliĉegaj kaj ĝis la-la!

Vidu la fotojn ĉe:

<<http://www.facebook.com/media/set/?set=a.125684034171084.23458.100001884630245&type=3#!/media/set/?set=a.415914755148009.98430.100001884630245&type=3>>.

Olĵa Muranova (Sankt-Peterburg)



ESPERANTA PROGRAMO EN LA LINGVA FESTIVALO

La 7-a Moskva Internacia Lingva Festivalo (MLF-7) kun partopreno de ĉirkaŭ 1400 personoj sukcese pasis la 18-an de novembro 2012 en la rusia cefurbo, en la grandioza altlernejo, nuntempe unu el la plej prestiĝaj en la lando – La Nacia Esplora Universitato “La Supera Lernejo pri Ekonomiko” (NIU VŜE), situanta centre de Moskvo. La programo daŭris de la 11.00 gis la 21.00 kaj strukture estis kutima: Solena Malfermo kun parado de programkontribuantoj kaj kelkaj koncertaj numeroj, la 7 paraleloj de programeroj (sume: 70 lingvoj, prezentataj po dufoje, 20 lingvistikaj prelegoj kaj 10 naci-kulturaj eventoj) kaj la Solena Fermo kun granda koncerto kaj enmanigo de diplomoj kaj aliaj premioj.

MLF-7 estis neordinara evento de kelkaj vidpunktoj. Unue, komparebla laŭ la grandeco MLF-6 jam okazis komence de la sama jaro – la 12-an de februaro 2012 en Rusia Universitato de Interpopola Amikeco (RUDN). Due, unuan fojon en nia dispono por la Malfermo, aŭtoraj koncertoj kaj la Fermo estis aparta duetaĝa konstruaĵo – la Kultura Centro de NIU VŜE, kun du koncertaj salonoj por 250 kaj 500 sidlokoj, kaj por la baza programo – tri etaĝoj de la ĉefa studa konstruaĵo, kun 30 klasĉambroj kaj teknikaĵoj. Trie, la ritmo de la preparlaboroj kaj la paso de la aranĝo estis perfekte akurataj. Enkadre de la prepariĝo ni engaĝis novan elementon por la debutantoj – la modelajn lingvoprezentadojn fare de la plej spertaj kaj talentaj niaj instruantoj. Kvare, estis lanĉita nova solenaĵo – valorhavigo de la titolo “Honora partoprenanto de la Moskva Lingva Festivalo” – al la aktivuloj, kiuj 7 fojojn seninterrompe kontribuis al la organizado de la Festivalo aŭ al la programo mem. Kaj kvine, laste sed ne balaste: okaze de la 125-jariĝo de Esperanto estis organizita eksterordinare riĉa kaj varia E-programo. Pri ĝi – pli detale.

En la Solena Malfermo kaj la direktoro de la MLF en sia salutvorto, kaj la geanoncistoj dum la parado de la lingvoprezentantoj emfazis, ke la Lingvajn Festivalojn lanĉis kaj organizas esperantistoj kaj ke tiu ĉi Festivalo estas dediĉita al la 125-jariĝo de Esperanto. Bele prezentis sin la sesopa teamo de la esperantistoj-programkontribuantoj. La unuan fojon en la festivala historio la kvar prezentadojn de la lingvo Esperanto faris kvar diversaj personoj, kaj tiuj estas vere elstaraj esperantistoj: la eldonisto de REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) Georgij Kokolija (Moskvo), mondfama literaturisto Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin), interret-jurnalisto kaj lingvisto Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterburg) kaj E-akademiano, gramatikisto Pavel Moĵajev (Ukrainio). La multmedian prelegon “125 jaroj de la internacia lingvo Esperanto: historiaj paĝoj” okazigis sciencisto, verkisto kaj socia aganto Nikolao Gudskov. Unuhoran koncerton “Esperanto+” prezentis tradukisto kaj kanzonisto Pavel Moĵajev, kantanta ankaŭ en kelkaj aliaj lingvoj.

Alia speciala evento ĉi-festivale estis la Esperanta Gastejo kun la temo “Konatiĝu: esperantistoj!”, kiun gvidis Irina Gonĉarova. Ĉi tie kunvenis ĉiuj menciitaj eminentaj festivalanoj, aliaj esperantistoj kaj kelkdekoj da scivolemuloj el la publiko – por pasigi kune 40 minutojn en amika, neformala etoso, konatiĝante, kantante kaj festante la jubileon de Esperanto. Unu el la honoraj gastoj – la ambasadoro de Germanio en Rusio esperantisto Ulrich Brandenburg – flamigis tri ciferformajn kandletojn 1-2-5 okaze de la glora datreveno.

La scenaro de la Solena Fermo kun la elstare bonkvalita koncerto temis pri la historio de MLF, do pri tio, kiel aperis en Moskvo la Junulara Esperanta Klubo “EK MASI”, la Esperanto-kursaro “FaRo”, la kluba agado por la Eŭropa Tago de Lingvoj kaj – la Lingvaj Festivaloj. La tutan tagon funkciis Esperanto-stando kun ekspozicio de libroj, E-tradukitaj el diverslingvaj literaturoj, kie oni povis informiĝi pri la E-movado kaj kulturo. Ĉiuj E-parolantaj ĉeestintoj povis preni – donace okaze de la E-jubileo – bone videblan blankan insignon kun la verda steleto kaj la vortoj: “Mi parolas Esperante”, kiun la prenintoj devis porti dum la Festivalo, kaj eĉ esperantistoj mem surpriziĝis, kiom multas ni ĉi tie! Bonega reklamo – ĉu ne?

Preskaŭ same bona, kiel la plej-plej grava kaj efika, estis la informiteco de ĉiu ĉeestanto kaj neĉeestanto, ke tiu ĉi festo – la Moskva Internacia Lingva Festivalo, – estas ideo kaj laboro de esperantistoj! Onin ne lasos pri tio forgesi niaj prifestivalaj retpaĝaroj, grupoj kaj eventoj en sociaj retoj, la multkoloraj afiŝoj kaj flugfolioj, nia bela verdkolora programo, sen kiu ajna homo neeviteble perdiĝus en la Festivalo.

*Irina Gončarova, direktoro de MLF,
gvidanto de la Moskva Esperanto-Asocio “MASI”*

Klara Ilutoviĉ

Lingva festivalo

Dancas lingvoj en hororondo
Je l’ altiraj vestaĵ’ kaj sort’.
El la tuta vastega mondo
Flirtas hele post vorto vort’.
Brilas feste la lingva balo
Ĉe l’ senforta novembra sun’.
Venu hom’ al la festivalo –
Al jubil’ de la lingva kun’!

Lingvoj, kiel bonkoraj gastoj,
Sin prezentas per la rakont’,
Kaj impresas distingaj drastoj:
Ĉiu lingvo – l’ unika mond’!
Vivu lingvoj sen velko fata
En prospero kaj vivarom’.
Estu grava kaj respektata
Ĉiu lingvo por ĉiu hom’.
Ne kripligu ofendaj vanoj
Ajnan lingvon en ĝia rol’,
Sed, se kunas diverslingvanoj –
Kiel iĝu l’ interparol’?
Serĉoj-provoj plu emocias,
Dum invoke al kuniĝem’
Esperanto delonge scias
Ĝustan solvon de la problem’!..



SALATO POR ZAMENHOF

Tiel ni nomis nian lastan ĉi-jaran kluban programon, kiu estis organizita la 15-an de decembro en Palaco de Libroj okaze de la naskiĝtago de Majstro Esperanto. Samtempe tio estis la tria aranĝo, kie temis pri lingva



mondo entute. Niaj gastoj tradicie estis geamikoj el dimitrovgrada E-klubo “Verda suno” kaj ankaŭ reprezentantoj de du fakultatoj de Ŝtata pegagogia universitato, kiuj kune jam faris du programojn pri lingvoj.

La renkontiĝon de diversaĝaj geamikoj malfermis Svetlana Dirina, la estrino de fako pri literaturo en fremdaj lingvoj. Salutvorton en la nomo de dimitrovgradanoj diris Tatjana Ilutkina, la prezidantino de “Verda suno”. Gratulante nin okaze de la festo, ŝi transdonis al nia prezidanto Jurij Karcev esperantlingvan libron kaj skatolon kun bongustaj bombonoj, kiuj senprokraste trovis siajn lokojn: la libro – en kluba “regalo” kaj la bombonoj – sur festa tablo.

La festa “tablo” estis ornamita ankaŭ per aliaj “manĝaĵoj” – koncertaj. La partoprenantoj povis ĝui brilajn dancojn de Ljudmila Rogova kaj Vladimir Salomatin, spekti kvar diverslingvajn teatraĵetojn (germanlingvan laŭ balado de Goethe “Elforeĝo” kaj tri esperantlingvajn). Sergej Abramov kaj Larisa Morozova rakontis al ni pri la unua renkontiĝo de Ludoviko kun Klara, Tatjana Ilutkina kaj Marina Astafjeva preparis ŝercon pri babilema kaj scivolema nepino kaj tre serioza laca avino, kaj ĉiuj studentoj, gvidataj de Irina Obuĥova kaj Sergej Abramov, sen longaj provludoj bonege improvizis temon pri “Pakaĵo” (laŭ versaĵo de S.Marŝak).

Krome sonis kanto pri “Samara, la urbet’”, kiun tradukis nia Tatjana Kuzmina kaj per kiu ni salutis niajn geamikojn en Samara, ĉar bedaŭrinde pro diversaj kaŭzoj neniu el niaj du kluboj povis partopreni Zamenhof-aranĝon en Samara. Ni esperas, ke ili nin aŭdis.

Sergej Abramov voĉlegis versaĵon de dimitrovgradano Vladimir Ŝĉotkin, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Tatjana Ilutkina deklamis poemon en la bulgara lingvo.

La plej bona koncerta fina akordo iĝis “Ho, mia kor’”, plenumita de Vladislav Trofimov.

Niaj gastoj sukcesis ankaŭ viziti la artan eksponejon de la Palaco. Kaj certe ni priparolis niajn kunajn novjarajn aranĝojn. Ni ne forgesis ankaŭ gratuli ĉiujn okaze de Tago de Teo dum festa tetrinkado.

En Kamena halo de la ĉefa regiona biblioteko estis montrita komputila prezento



pri klubaga agado de la jaro 2012, titolita “Draka jaro aŭ ripozo kaj iomete da Esperanto”. Evidentiĝis, ke niaj geklubanoj ne nur ripozis, sed ankaŭ ion faris por Esperanto. Tio ne estis grandaj eventoj. Tamen... Laŭ L.Zamenhof – “Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.”

Ni esperas. Verŝajne tial ni nomis nian oficialan programon, dediĉitan al L.Zamenhof, “Esperanto”. Kaj “Salato por Zamenhof” estas ŝerca aranĝa titolo, ĉar diverslingvaj numeroj de nia programo similis al ingrediencoj de originala bongusta antaŭnovjara salato.

Margarita Karceva (Uljanovsk), fotoj de Olĝa Sirotinina

ULJANOVSKA E-VIVO DUM DRAKA JARO

Januaro:

– niaj klubanoj organizis en Palaco de Libroj du programojn: “Vidu, kiu venis” (Novjara festo kune kun niaj geamikoj el Dimitrovgrado) kaj “Vojaĝo al Italio” (ĉefmotoro – Olĝa Sirotinina);

– privata vizito al Ufa, konatiĝo kun Nina Cvileneva, renkontiĝo kun Olĝa Terentjeva kaj kuna vizito al Lenin-muzeo, kie ni donacis al la muzeo esperantlingvan faldfolion pri Lenin-memorejoj en Uljanovsk kaj skribis salutvortojn en la gastlibron (ankaŭ en Esperanto).

Februaro:

– en la Palaco de Libroj okazis programo “En la mondo de muziko”, dediĉita al P.I.Ĉajkovskij;

– aperis tri faldfolioj (de O.Sirotinina kaj M.Karceva), en kiuj temis pri baletoj de la fama komponisto. Krome ni uzis tekston pri la muzikisto, kiun ni ricevis de nia amiko el Ijevsk Bronislav Ĉupin;

– aperis klubaj ĵurnalo “Verda Teo” № 1 (2012).

Marto:



– okazis nia jubileo Lingva Festivalo. La deka! Tio estis granda evento por partoprenantoj, vizitantoj kaj organizantoj.

Aprilo:

– aperis kluba ĵurnalo “Verda Teo” № 2;
– en Palaco de Libro estis montrata ekspozicio “Raraj Esperanto-libroj en la regiona scienca biblioteko”.

Majo:

– la klubanoj kune vizitis kinofestivalon, dediĉitan al Valentina Leontjeva;
– en la urba parko kunvenis komencantoj-tradukistoj (Jelena Tubalec kaj Sergeo Abramov). Tiu kurso estis gvidata de Jurij Karcev.

Junio:

– naskiĝis du Anna-j, du filinoj en la familioj de Marija Karceva kaj Nikolaj Paveljev;
– edziniĝis Elmira Kuĉatova;
– okaze de jubileo aperis esperantlingva faldfolio pri kaj por Konstantin Barkov, dirigento de simfonia orkestro, kies koncertojn ĉiuj niaj klubanoj vizitas kun grandega plezuro.

Julio:

– diversaj privataj vojaĝoj de la klubanoj dum kiuj ili rakontis pri Esperanto, uzante konvenajn momentojn;

– estis preparata faldfolio de Ljudmila Kulbakova “Undori” pri uljanovska kuraĉloko;

– kun helpo de Zsófia Kóródy, kiu provizis nin per kelkaj fotoj de la fama urbo, estis farita komputila esperantlingva prezento “La Esperanto-urbo Herzberg” (aŭtoro M.Karceva).



Aŭgusto:

– aperis scienca artikolaro de Uljanovska ŝtata pedagogia universitato, kie estis publikigitaj du artikoloj pri kelkaj eblecoj de uzado de Esperanto (aŭtoroj: B.Ĉupin, O.Sirotinina, M.Karceva).

Septembro:

– en la nova distrikto de nia urbo (Zavolĵje) okazis malfermo de lingva studio “Eŭropo”, kie estis anoncata Esperanto;

– nia teamo partoprenis la duan lingvan festivalon en Ufa kun prezento pri Germanio. Tie ni renkontiĝis/konatiĝis kun spertaj esperantistoj Nina Cvileneva, Gafur Gazizov, Nikolaj Ŝigajev, Larisa Kuzmenko kaj vizitis E-prezenton de Nina, Gafur kaj Nikolao. De Gafur Gazizov la uljanovskanoj ricevis diskon kun liaj versaĵoj.

Oktobro:

– en la regiona porinfana biblioteko kunvenis junularo por prezenti al publiko ŝatatajn tekstojn. Eblis voĉlegi la tekstojn aŭ deklami ilin parkere. Ĉiuj lingvoj estis “invitataj”. Sergio Abramov alportis esperantlingvajn tekstojn de konataj kantoj “Se vi ne ekzistus plu” kaj “Babelturo” por komuna kantado. Tio sukcesis;

– Lingva festivalo en Ĉeboksari (la 17-a)! Ne eblis ne viziti ĝin! Ni prezentis la tataran lingvon (Elmira Kuĉatova, nun Valiullova) kaj vizitis E-lecionojn de Aleksandr Blinov kaj Aleksandra Moisejeva. Kiel ĉiam – brile fari-tajn;

– komenciĝis nova E-kurso de Sergej Abramov en Palaco de Libroj;

– aperis kluba ĵurnalo “Verda Teo” № 3;

– estis farita komputila prezento “Uljanovsk. Krefeld. Ĝemelurboj” en kvar lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Aŭtoroj: Julija Ravina, Julija Savina, Margarita Karceva;

– estis eldonita E-kalendareto por la nova jaro (pentristino – Irina Pleŝakova).

Novembro:

– nia teamo partoprenis TILE-7;

– la 15-a projekto “Ni legu tekstojn kune” iĝis unujara. Sergio Abramov voĉlegis versojn de V.Karzin “Esperanto” (ruslingve) kaj lian tradukitan en Esperanton versaĵon “Vojo”;

– estis aranĝitaj du programoj “Lingva bildo de la mondo” en Palaco de Libroj (17.11, 24.11). La programojn partoprenis studentoj de du grupoj (diversaj fakultatoj de Uljanovska ŝtata pedagogia universitato: fremdlingva fakultato kaj fakultato pri pedagogio kaj psikologio). Temis pri Esperanto. Ni lernis kantojn, ludis, spektis filmon pri Esperanto kaj prezenton pri uljanovska klubo;

– aperis komputila esperantlingva prezento pri kluba agado dum tiu ĉi jaro kaj kluba ĵurnalo “Verda Teo” № 4.

Decembro:

– ni festis Zamenhof-tagon.

Ĉu la jaro sukcesis? Eble, jes. Ni faris ankoraŭ kelkajn paŝojn antaŭen.

*Margarita Karceva
(Uljanovsk)*



EN

... ĝi **enaferigis** la Unuiĝintajn Naciojn.

M.Lennartz, el la germana, Paco, GDR-eldono, 1974, p. 9

... laŭ Markso, la laborista klaso **enoble** ekzistas antaŭ ekzisti **enage** pro la klaskonscio.

La Gazeto, 15 (mar. 1988), p. 5

La domanoj scias, ke ili ĉiam povas kalkuli je la glaso. Ĝi estas ja ĉiam surloke, ĉiam la saman kvanton **enakceptas** kaj iom da tempo tenas ĝin varma.

István Nemere, or., Hungario, Heroldo de Esperanto, 12, 2006, p. 3

Pli poste, Kraleviĉ **enamikiĝis** kaj kvazaŭfratiĝis al Halilo: *Kune ili gardis la terojn de la Sultano /ambaŭ militis kontraŭ malamikojn/ kaj*

Chuma Ĉupa, or., Albanio, La Gazeto, 122 (jan. 2006), p. 23

Li ekbruligis ĝin, profunde **enavidis** tutan buŝplenon da fumo, kiun post kelkaj momentoj li resendis tra la nazo kaj tiam parolis...

Raymond Schwartz, or., Francio, Kiel akvo de l' rivero, 2-a parto, Dansk Esperanto-Forlag, 1958, p. 326

... ĉar kometo havas multe pli grandan mason ol meteoro. ... Ĉirkaŭ la **enbatoj** disvastiĝis aerprema ondo rapida 1000 km en horo.

Walter Klag, or., Germanio, Monato, 1993, 6, p. 16

Pasas la du infanoj singarde trans la **enbreĉitan** muron kaj forpostigas sin hejmen.

Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroata Prozo, Zagreb, 1979, p. 253

La olimpestra mano plu enfosis en ŝia bukla kapaĵo kaj avide gratetis. Subite **enbruis** paŝoj. Hastaj. Svingaj. Spitaj.

Gonçalo Neves, or., Fonto, 140 (aŭg. 1992), p. 13

Sora malstultulumu. Genoperaciojn oni faras nur por siaj samcirkloj. Nun ili ne povas helpi. Tio estus malobeo al...

“Tio estus malobeo al la Unua principo”, **endiris** Sara.

Jovan Zarković, el la serba, D.Mikuličić, “O” kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 106

Jam plurfoje mi plendis ĉe la estraro ke ĝi neniom zorgas informi la esperantistaron pri la faritaj laboroj, pri la **endiskutaj** problemoj.

Aldo de' Giorgi, or., Italio, Esperanto, 1997, 4, p.70

Ili, **endronaj** en la ĉiutagaj problemoj, apenaŭ havis tempon por ...

or., Kroatio, Tragedio en la Universo, Zagreb, 1961, p. 35

Anstataŭe, ni havu pli grandan spacon por libertempo kreiva, edukado, **enfamilia** vivo.

Dieter Rooke, or., Svislando germanlingva, Heroldo de Esperanto, 14, 2006, p. 2

La lingvaj misoj rimarkitaj en La Fermita Urbo. ...

b) Pri la uzado de verboj kaj verbotensoj (precipe en subpropozicioj enkondukitaj

¹ La antaŭaj parto aperis en REGo № 3-4 (70-71) – 5 (72), 2012.

per ke): ĉi tie, plej frapas, la konstanto kaj ofteco de “fermi” anstataŭ “enfermi”: “Tiuj homoj fermitaj tie, estas nesanigeblaj”, “La knaboj fermis lin en la saman ĉambron, kie vi estis fermita”, ...

Miguel Fernandez, Hispanio, La Gazeto, 105 (mar. 2003), p. 23

En kafejo Esperanto okazis la 16.12.1979 parolado de s-ano inĝ. Jiri Pastor pri: Vagadoj tra la bulgara **enlando**, kun koloraj diapozitivaj.

Starto, 1980, 1, p. 21

Li posedis **enmaskitan** obstinan karakteron.

F.Faulhaber, el la nederlanda, Tjeerd Adema, Dekkinga fuĝas, Dansk E-Forlag, Aabyhøj, 1957, p. 7

Inter la ŝultroj de Priester kaj de la kamparano mi **enokulis** la internon de la ŝtalo.

Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroata Prozo, Zagreb, 1979, p. 236

Malpli longa nigra limuzino fine venis, **ensidis** nur la ambasadoro kaj lia ŝoforo.

Ge-Rapley, or., La Ondo de Esperanto, 2002, 11, p. 6

Estis tio simila al liberiĝo el malliberejo. Kvazaŭ ni du kune estus elvenintaj el malliberejo post longega **ensidado**.

Istvan Nemere, or., Hungario, Nesto de viperoj, eld. Impeto, Moskvo, 1994, p. 128

En ĉiu ĉelo troviĝas metala poto aŭ sitelo kun kovrilo. Dum la horoj de **enŝloso** oni uzu tion ĉi se estas tri en unu ĉelo. Imagu la odoron, la malprivatan honton.

Green Will, or., Anglio, Monato, 1990, 5, p. 22

Tio estis kolosa alta arbo, tiel maljuna, ke grandaj haroj pendis de ŝiaj branĉoj ĝis la grundo, kaj formis tapiŝon, tra kiu ŝi **entrinkis** kaj eltrinkis...

Geraldo Mattos, or., Brazilo, Fonto, 257 (maj. 2002), p. 4

Envido en krea procezo profitigas kaj la kreanton kaj la spektanton.

Frnaz Georg Rössler, or., Germanio, Monato, 1996, 3, p. 28

Lia **envojo** ne levis problemon: dissemo de segitaj plankeroj ĉirkaŭ truo, kiu kredeble kondukis al la kelo.

Lorjak, or., Iluzioj, HEA, Budapeŝto, 1982, p. 29

Tiun tagon la mano de Ole due skuiĝis ec pli ol ordinare. El la komuna plado, meze sur la tablo, lakta vojo kondukis al la tabla randa kaj supren laŭ lia bela veŝto – rekte en la buŝon. La kulero je ĉiu **buŝena** iro, disverŝis iometon post si...

Finn Elwarth, el la dana, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 22

– Kion, kio? – respondis la alia, impete **deen** la ĉambro, rigardante...

António De Macedo, or., La Kancerkliniko, 87 (jul. – sep. 1998), p. 11

FOR

Li, cetere, ne jam bezonis tiun virinon post kiam li **foramis** ŝin.

A.Gončarov, or., Rusio, dum parolo en naŭdekaj jaroj

Kvankam akcesoraj en la kunteksto, tiuj rimedoj prioritare kaptis la atenton de kelkaj E-istoj. Grandan tempon ili **forbabilis** pri la preciza esperantigo de la termino *Portfolio*.

Heroldo de Esperanto, 2005, 15, p. 3

Ivahu aplombe **forbobenis** ŝnuron desur la pakajo... poste ŝiris la ferfadenon el, faligis la bombon flanken.

Oldřich Knichal, or., Ĉeĥio, Fonto, 8 (maj. 1981), p. 18

La esperanta libro ne perdas valoron. En la nacilingvaj libromerkatoj libroj devas vendiĝi dum kelkaj monatoj – poste oni aŭ **forbrokantaĵas** aŭ detruas ilin en paper-mueliloj...

Gonçalo Neves, or., Literatura Foiro, 156 (aŭg. 1995), p. 189

Li enpenetris sian rustan Lancia kaj **forbru**is lasante ondojn da haladza elgaso.

Corrado Tavanti – István Ertl, or., Italio – Hungario, Tiu Toskana septembro, HEA, Budapest, 1990, p. 28

Kial la komunista reĝimo **forcenzuris** tiun frazon-alineon? Evidente, ĉar ĝi timis, ke la legantoj, precipe la junaj, ekscios, ke Masaryk estis siatempe prezidanto de Ĉeĥoslovakio!

Kurisu Kei, or., Japanio, La Gazeto, 122 (jan. 2006), p. 10

Sed mia unua surpaperigo neniam definitivis. Mi enŝovas, ŝanĝas, forstrekas re kaj re, kaj ne malofte mi **forĉifas** tutan elplumaĵon paperkorben. Kial? Nu, simple, ĉar mi transiris al stadio de ricevanto de mia propra mesaĝo, kaj ekfunkcias mia kritika pupilo, ĝis tiam blindumita de la krea fulmado.

Miguel Fernández Martín, or., Literatura Foiro, 157 (okt. 1995), p. 234

Je kioma horo, via moŝto? Por ke mi, pro Sinjoro Kristo, ne **fordormu**.

Vladimir Váňa, el la ĉeĥa, Jaroslav Hašek, Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito, eld. Kava-Pech, 2004, p. 29

La direktoro... Ja rekoneblas la vizaĝaĉo... gurde pri la nepra neceso limigi la salaĵojn, narkote pri la unika bonŝanco kunlabori al iu hipoteza sukceso **for-estonta**, trans la horizonto de nunaj prognozoj...

Christian Rivière, or., Francio, La Ondo de Esperanto, 2005, 1, p. 19

Sed **for-estontece** mi vidas nur tri eblecojn...

Ulrich Becker, or., Germanio, Eventoj, 1995, 1/feb., p. 2

Kaj mem kiel eble plej fiaskis. **Forfajfis** abiturientan ekzamenon (pri ĥemio) – simple ne ĉeestis, ĉar ŝi sciis, ke vane – kaj tial trafis en malĝustan fakon, en malĝustan jaron... Vi forridus la kirurgion!

Meva Maron, or., La Gazeto 40 (apr. 1992), p. 9

La birdaro rapide **forflugilis** hejmen.

A. Gončarov, or., Rusio, ekzemplodona arbitra frazo

Torreón, la dezerto-urbo, je tre blankaj montoj kaj tre verdaj arboj. Torreón, vi perdiĝis en la malproksimeco. Ho! **Forforejo** blanka de miaj songoj!

Peter Browne, or., Usono, La Gazeto, 105 (mar. 2003), p. 16

Kvankam ni loĝis en la sama domo, manĝis ĉe la sama tablo kaj ofte spektis la samajn TV-programojn ni ne estis amikoj. Ni **forfremdiĝis** unu de la alia. Ni fariĝis “intimaj fremduloj”.

Leen Deij, or., Nederlando, Heroldo de Esperanto, 2004, 3, p. 3

Mi ĉiam **forĝestis** Esperanton kiel idiotan Orient-eŭropan eksperimenton, kiu pereis dum la kvindekaj jaroj, atinginte saman historian valoron kiel koksringoj.

William Auld, el la angla, La Kancerkliniko, 74 (apr., maj., jun. 1995), p. 5

Via propra teksta praktiko montras, tamen, ke vi ne rigardas kiel hipokrita vian insistan amarecon, kvankam ankaŭ ĝi **forgrizas** la dolĉajn realerojn.

Probal Daŝgupto, or., hindo, Literatura Foiro, 185 (jun. 2000), p. 158

Kozarac priskribas ankaŭ la ekonomian utilon kaj sian propran triston post la forhakado de la arbaro: *Mian koron neniu tombejo tiom tuŝis, kiom tiu arbara **forhakejo***, li diras.

Davor Klobučar, el la kroata, Literatura Foiro, 183 (feb. 2000), p. 24

Li **forhezitis** ankoraŭ kelkajn tagojn...

Karl Schulze, el la germana, B.Brecht, Trigoŝa romano, Edition Leipzig, GDR, 1977, p. 6

Ili komencis disiri. Iu forkuris suben laŭ la rivereto apud zigzaga vico da salikoj, iu forpuŝiĝis almonten, la tria **forkantis** tra maizaron.

Jovan Zarković, el la serba, D.Mikuličić, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 44

Venis la granda tago de la ekzameno. Vi kuraĝigante **kisis for** tutan mian nervezon.

Horst Vogt, or., La Gazeto, 91 (dec. 2000), p. 22

Pritraktante la tiklan temon kun francoj kaj svedoj mem, mi miris, ke ambaŭ grupoj provas **forklarigi** sian ksenofobion – ili ne neas la karakterizon! – kiel rezulton de historiaj faktoroj.

Bernard Golden, or., Usono – Hungario, Literatura Foiro, 158 (dec. 1995), p. 328

Eĉ se ni supozas aparteni al la literatura avangardo, mi postlamas tamen la eventojn, certe senlacaj, ĉar la inta kaj la anta, murde sinregala, ne eskapas nin. Kion la historiistoj intencas **forklasi**, tio restas por ni aktuala,

Literatura Foiro, 221, (jun. 2006), p. 124

Iom amuza estas la kristanigo de granda parto de la islandanoj... Pri la esenco de kristanismo: "... ĉiuj homoj en tiu ĉi lando estu kristanoj kaj kreu je unu Dio – Patro, Filo kaj Sankta Spirito – kaj **forkonfesu** ĉiun kulton de idoloj."

Donald Broadribb, or., La Gazeto, 118 (apr. 2005), p. 24

La aliaj lingvoj ne devas esti **forkonsiderataj** kiel "minoritataj" lingvoj, ĉar ja la tuto de ĉiuj, kiuj parolas ilin formas substancan proporcion de la popolo.

el la angla, Kontakto, 1996, 5, p. 2

Aliflanke viro kaj infano surgrimpas la muron, la knabo petolas, dancas sur ĝi... Trankvila soldato apogas eskalon al la muro, surŝtupas, tre afable – laŭ la movoj mi juĝas – **forkonsilas** la limdezirantojn, helpas malgrimpi...

István Ertl, or., Hungario, La Gazeto, 97 (dec. 2001), p. 15

Estimataj, mi tre ĝojis legi en HeKo n-ro 305 tekston pri Patrino Tereza el Kalkato – ... ke ŝi estis albandevena. Pro tio, ke ŝi fariĝis kultura ikono de la moderna karitato, certe al multaj ĉesis gravi ŝia deveno, kaj ni deziras parte aliĝi al la ĝenerala

deziro **forkreski** for de tro da atento al la devenlandoj.

Probal Dasgupta, or., Hundio, Femina, 7, 2006, p. 6

La kudristino tiam replikis per mallaŭta voĉo: “Mi ĝojas certe, sinjoro pastro, mi ĝojas. Mi jam vidas: li frue **forkreskas** de mi kaj mia dometo.”

“Li estas knabo!” diris la pastro.

Wilhelm Theodor Oeste, el la germana, La Gazeto, 109 (dec. 2003), p. 25

Partoprenis 86 homoj, ĉefe gejunuloj, plejparte de la Moskva regiono, sed venis ankaŭ kelkaj **forloĝantoj**.

Baard Hekland, or., Norvegio, La Ondo de Esperanto, 1999, 1, p. 8

Verkoj de kontentiga lingva nivelo – precipe longaj prozaĵoj – kiuj **foroferas** estetikajn kriteriojn por amasa populareco.

Norda Prismo, 1972, 2, p. 70

La restigitoj **forokulis** ilin svingante manojn. Hamada reiris al sia tendo...

Miyamoto Masao, or., Japanio, Naskitaj sur la ruino Okinava, Japanio, 1976, p. 59

Tute naiva por suspekti, la ĉefkomizo foriris kun granda kontento, ripete kaj ripete riverencante. La kuracisto, kiu **forokulis** lin kun grimaco, nun turnis sin al la edzino...

Konisi Gaku, el la japana, Akutagawa Ryunosuke, La diulo, Japanio, La Ondo de Esperanto, 2006, 3, p. 18

Li ne ŝlosis pordon, kaj ni ofte pasigis la vesperojn en la kajuto, ĝis ni devis **forpafi** nin.

Joxemari Sarasua, el la eŭska, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 6

Mi preskaŭ ne memoris ŝin, kiu estis tiel etulina kiam mi devis **forpafi** min.

Manuel de Seabra, or., Hispanio, La Kancerkliniko, 71 (jul.-sept. 1994), p. 5

– Venontan mardon ne forgesu viajn maskojn! estos karnavalo! hura!

Tiamaniere ekkriinte, li **forpereis** en la malpuran nebulon, kiu la straton dispecigis.

Mikaelo Grajn, or., Rusio, Norda Prismo, 1972, 2, p. 98

Sed kiam poste li petis oficiston havigi aliajn vestojn, la gardisto diris, ke li “**forpisiĝu**”. David refoje aliĝis al li en la stufejo.

Trevor Steele, or., Aŭstralio, Literatura Foiro, 198 (aŭg. 2002), p. 199

... aŭ kiel **forposteno** en fremda kulturo (Int.H.Tribune) ankaŭ Israelo estas la plej bona nepostulema alianco... pri kiu ni iam ajn povus esperi.

H.M.Al-Amily, or., Arabio – Britio, Internaciisto, 2002, 6, p. 5

Pasas la du infanoj singarde trans la enbreĉitan muron kaj **forpostigas** sin hejmen.

Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroata Prozo, Zagreb, 1979, p. 253

... li jam povis fumi dudek opiopipojn per unu fojo kaj, ke en la aĝo de dudek ok jaroj, li jam **forregalis** plurajn amatinojn.

E-klubo, reviziis Minh Kinh, el la vjetnama, Senelirejo, Fremdlingva Eldonejo Hanojo, Vjetnamio, 1963, p. 43

Ili jam ŝrumpis al rosinoj sed ankoraŭ gustis dolĉe, por la ĝojo de la infanoj, kiuj kuradis ĉirkaŭ la tablo kaj fojfoje ŝtelis de la abundo, dum la rigoraj okuloj de

Panjo **forrigardis** por momento.

Tino Terzi, Literatura Foiro, 204 (aŭg. 2003), p. 308

En 1962 nin **forsalutas** la *nica literatura revuo*. Ĝi konsideras sian taskon plenumita; ... Efektive ĝi savis el la forgesujo multajn pecojn...

Carlo Minnaja, or., Italio, Literatura Foiro, 218 (dec. 2005), p. 288

Estis unuasemajne de junio kiam mi fosis, kaj triatage ne plu estis eble **forsiteli** la akvon, Teresa tute laciĝis, mi estis veninta rekte en fontakvon, estis sablo... sed eĉ bovinaj ne povis igi sin trinki ĝin... mi... kaj poste malfosis la puton.

Sten Johansson, el la sveda, Fonto, 89 (maj. 1988), p. 36

Serĉante sian **forsorĉitan** edzinon Jurges travojaĝas konatajn fantaziajn kaj legendajn teritoriojn...

Nikolao (Claus) Günkeli, or., La Gazeto, 103 (dec. 2002), p. 25

... timas nenion kaj montras respekton al neniuj. La vilaĝestro, la prezidanto de la komunuma konsilantaro... li **forspitas**.

Senelirejo, Fremdlinga Eldonejo Hanojo, Vjetnamio, 1963, p. 34

Kiam onklino en sia amelita antaŭtuko, surhavata ankaŭ ĉetoble, **forsusuris** de la ĉambro, mi reenforteliĝis sub la staranta lampo.

Oldřich Kníhal, el la ĉeĥa, Panoramo, 1980, Praha, p. 67

... ni edukas nian altan nobelaron tiel zorge en niaj kolegioj, trejnigas ĝin, pene **fortenas** de ĝi ĉiun misformantan scion...

Karl Schulze, el la germana, B.Brecht, Trigraso romano, Edition Leipzig, GDR, 1977, p. 110.

Alia misiano informis, ke homoj, kiuj volis ĉeesti protestantaj kunvenojn en landlimaj regionoj, **fortimiĝis**.

IRL, or., Nord-Irlando, Monato, 1998, 3, p. 10

Post fari la plej neceson, mi **fortrajnis** hejmen.

A.Gončarov, or., Rusio, kiel ekzemplo

Ili **forurĝis** sin laŭ la streta, meandra, skuige kava vojeto Namko-a, joradante kiel alpaŝita-apenaŭ-maltrafa fluganta anasaro.

K.Jakobo, el la angla, La Gazeto, 33 (mar. 1991), p. 26

Tra la stratoj de urbegoj, sur dezertaj provincaj vojoj, en malgrandaj vilaĝoj kaj **forvilaĝetoj** – ĉie regis morttrezoro...

E-klubo, or., Jugoslavio, Tragedio en la Universo, Zagreb, 1961, p. 72

Se mi bone komprenas vian vidpunkton, formuloj dolĉaj estas nepre hipokritaj laŭ vi. Ili **forcenzuras** gravajn realaĵojn.

Probal Dasgupta, or., Hindio, Literatura Foiro, 185 (jun. 2000), p. 158

ĜIS

Tiu traduko montras **ĝisdatecon** de Esperanto el teknika vidpunkto.

Esperanto, 1972, p.130

Fanoro **ĝisfingris** la lastajn vortojn kaj eliris la ĉambron. [supre temis pri tajpado]

Corrado Tavanti – István Ertl, or., Italio – Hungario, Tiu Toskana septembro, HEA, Budapesto, 1990, p. 132

Kaj kun kia **ĝiskortuŝa** humileco nia erudiciulo sekvas la Kalvarian Vojon, la simbolojn, kiuj troviĝas en ĉiu katolika preĝejo, stacion post stacio, por fine konfesi: ...
Lydia Kerremans, or., La Gazeto, 108 (okt. 2003), p. 27

Ĝis-malfrua babilado – foje brua – malhelpis profundan dormadon de interalie neesperantistaj najbaraj gastoj...

Reza Kheirkhan, or., Irano, tejo tutmonde, 1999, 4, p. 20

Juna aŭstralia diplomato, esperantisto Ralph Harry, verkis la unuan malneton de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, surbaze de kiu oni **ĝismarĉandis** la finan tekston.

Probal Dasgupta, or., Hindio, Heroldo de Esperanto, 2008, 16, p. 2

Jam ĉe **ĝispaŝo** antaŭ la angulo li pretigis sin...

Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 544

... kaj plej memorinde la tri fratinoj de la vojo, ĉiu kun longa nigra hararo **ĝispendanta** la zonon.

Peter Browne, or., Usono, La Gazeto, 107 (jun. 2003), p. 12

Vidite el flegma posteno en Nordio lia poezio **ĝisplue** konsiderinde plivaloras ol lia novelivo.

Poul Thorsen, or., Literatura Foiro, 151 (okt. 1994), p. 271

INTER

Je la naŭa ili decidis iom promeni kaj forte **interbrakita** la duopo paŝis tra la... stratoj.

F.Faulhaber, el la nederlanda, Tjeerd Adem, Dekkinga fuĝas, Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, 1957, p. 187

Kaj mi vere ne povas eltrovi kulturvaloron krom la literaturo, kiu povas **interĉeni** homojn diversnaciajn.

Kálmán Kalocsay, or., Hungario, Norda Prismo, 1972, 3, p. 134

La frazo sonis kvazaŭ magia tondro el feina **interdento**; okjaron paraliziĝa mi preskaŭ sidiĝis de sur la lito.

Mao Zifu, or., Ĉinio, Monato, 1994, 12, p. 24

La negativon ni sendis kolombe – **interdiris** Elza.

Jozo, or., La Kancerkliniko, 65 (jan.-mar. 1993), p. 25

Ĉefa ŝia zorgo estas ke miloj da familioj devas esti prizorgataj. Nutraĵoj por la **interdume** multe naskiĝintaj beboj, vestaĵoj por ili.

or., Anglio, Internaciisto, 1985, 1/2, p. 7

En tiu momento, ŝi vidis, ke la folioj de alia arbo ektremis en tia sama maniero, kiel la ŝiaj ektremis, kiam ŝi pensis... Kaj en tiu ĝusta momento ŝi komprenis, ke la alia arbo parolas al ŝi; ili akiris do kapablon paroli. Nu la vorto paroli ne estas la plej bona por difini ilian interagon: ili **interfoliis**...

Geraldo Mattos, or., Brazilo, Fonto, 257 (maj. 2002), p. 4

Mi pardonis, ĉar ege mi amis lin, sed neniam plu mi povis lin rigardi kiel antaŭe. Kiam ni renkontiĝis, **interiĝis** nin io fremda, io malluma.

Sándor Szathmári, Kain kaj Abel, HEA, Budapest, 1977, p. 193

De tempo al tempo la doganistoj **interkaptas** grandajn sendaĵojn de drogaĉoj.

Madzy van de Kooij, or., Nederlando, Monato, 1996, 6, p. 8

... ni devas daŭrigi la jam... komencitan instaladon de tri karakterizaj bazoj, kiuj donu al Esperanto unikan identigeblon kiel novtipa laborilo: (a) ponta tradukado, (b) **interliteraturo**, (c) prinorma intertraktado.

Probal Dasgupta, or., Hindio, Esperanto, 2007, 12, p. 244

JAM

El la artutero, el biokemia laboratorio imitanta la funkcion de patrino, kiel nutraturo kiel gargilo de la feto, estis eliĝontaj **jaminfanoj**. Ĵusnaskitoj.

Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 50

Kelkfoje klarigoj estas donitaj, alifoje ne, kiam kunteksto aŭ **jam-instruitaĵo** devus sufiĉi.

Stefan MacGill, or., Nov-Zelando-Hungario, Literatura Foiro, 126 (aŭg. 1990), p. 52

Jovan Zarkoviĉ iel freŝe rompas nian **jamkutiman** uzadon de afiksoj: "disĉifoni"...

A.Gonĉarov, or., Rusio, La Gazeto, 32 (okt. 1990), p. 25

... kaj la landoj de la tria mondo. Ili bezonas la konsilon de teknikaj spertuloj, multe pli ol la **jamindustriigitaj** nacioj...

Sara Su Jones, or., Usono, La Espero el Koreio, 1993, 6, p. 16

ĴUS

La infano esploris. Ŝi prenis la graŭlulon sinen, kaj komencis ĉio-vorti pri kapreolinoj kiuj **ĵusaperis** sur arbara klarejo kelkajn metrojn sub la tempomaŝino.

Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 11

... la virinoj alfenestriĝintaj estis ĉiuj similaj, ĉar la komuna sento de ĉioa sensenco presis sur ilin tiun neŭtran aspekton, videblan ĉe fiŝoj aŭ ĉe **ĵus-mortintoj**.

António De Macedo, or., La Kancerkliniko, 87 (jul.-sept. 1998), p. 11

... ke BA reprenis ĝian privilegion publikigi verkojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj de UEA, sed ankaŭ pro la **ĵusnaskita** La Karavelo – literatura ret-revuo, evidente ankaŭ baldaŭ papera, eldonata en Portugallingvuj.

Alko (Aleksander Korĵenkov), or., Rusio, La Ondo de Esperanto, 2007, 12, p. 2

Resonatoroj ĉi tie estis la nura ligilo inter la devenejo prauniverso kaj ĉi tiu kosma **ĵusovo**...

Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 25

Ĵusminuta bezono – ruse: сиюминутная потребность.

A.Gonĉarov, or., Rusio, 1980-aj jaroj

KIO AJN PREFIKSO

La **mi-demokratio** [titolo de artikolo]

... Kulmino de tia **mi-kulto** estis solena subskribo de “kontrakto”...

Sed ankaŭ en aliaj tradiciaj okcidentaj demokratioj ni vidas tendencon al tia **mi-ismo**. Memoru la duelon inter...

Stefan Maul, or., Germanio, Monato, 2001, 8, p. 5

Kiam ili leviĝis en mateno, anstataŭ la kutima saluto ili pridemandis pri la **kie-esto** de Sark.

La Espero el Koreujo, 1984, 1 (58), p. 10

Diskreta **jeporda** frapo rompis la intersekvon de ŝiaj pensoj kaj elseĝigis Tibblon. Li iris al la pordo...

Finn Elwarth, el la angla, Fonto, 263 (nov. 2002), p. 24

Antaŭ malpli ol dek jaroj Brabanto, la centra belga provinco, splitiĝis en du provincoj: Flandra Brabanto, kie regas la flandra lingvo kaj Valona Brabanto, franclingva. De tiam Loveno estas la **tutjuna** ĉefurbo de la **tutnova** provinco “Flandra Brabanto”.

Marc Vanden Bempt, or., La Gazeto, 100 (apr. 2002), p. 38

... rekomendas al Eksmikado Toba lian kvaran princon Masahito, fraton **samut-eran** de Eksmikado Sutoku...

Bam Buo (Hukui), el la japana, Riveroj, 1998, nov. (22), p. 11

... kaj **ajnlatituda** leganto sentas sin fascinita antaŭ la arto...

Miguel Fernández, or., Hispanio, La Gazeto, 77 (jun. 1998), p. 9

Petro sidiĝis kaj komencis manĝi, dum ŝi **ajnokupetis** sin, surtabligante salon kaj brandon kaj simile.

Finn Elwarth, el la dana, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 26

KONTRAŬ

Ankaŭ Abraham Lincoln havis malicajn kritikistojn... Malgraŭ la grandega sukceso de la nordaj armeoj sur la batalkampo, li en 1864 havis foran **kontraŭkandidaton**: la Demokrata generalo Macllenon, kiu pledis...

Toon Witkam, el la uson-angla, La Gazeto, 108 (okt. 2003), p. 13

Jam vespero estas: kvietiĝas ĉio.

Nigre foliaron lulas akacio,

Zumas noktskarabo en flug’ **kontraŭmura**:

Ekfrapeto forta – postsilento nura.

Nikolao Törzs, el la hungara, Norda Prismo, 1967, 3-4, p. 161

Ŝi bezonis esti sola kvin aŭ dek minutojn por ordigi la pensojn, por elpensu manieron **kontraŭpersvadi** Georgon, fari kion lli planis.

Finn Elwarth, el la angla, Fonto, 263 (nov. 2002), p. 23

Fascina kontrasto: evidente didaktikaj celoj, ofte brile plenumataj de la prozo, kiel eble plej malfake, **kontraŭprofesore**, senceremonie (eĉ demagogie!) – kaj poemo (poemego!) tiel kaprompa ke ĝi kreis erudician universitatan disciplinon por interpreti ĝin.

Kris Long, or., Literatura Foiro, 136 (apr. 1992), p. 95

Pri Rosbach mi havas personan rememoron: mi lin ekkonis antaŭ pli ol duonjarcento kiam mi estis dekdujara knabeto kaj li estis juna, freŝa kaj laŭtvoĉa membro de la organiza komitato de la UK en Oslo, 1952. Li estis **kontraŭpruvo** al mia infaneca supozo, ke organizantoj, ĉefoj kaj gvidantoj estas grizaj, seriozaj kaj severmienaj altaĝuloj.

or., Heroldo de Esperanto, 2004, 14, p. 3

Tamen ni ankaŭ alfrontas multajn problemojn urĝe solvendajn... la teruraj tertremoj, la tajfunoj, la tromboj restas katastrofoj **nekontraŭrimedebaj**...

Li Shijun, or., Ĉinio, Esperanto, 2002, 11, p. 222

– Sed malbelege estus paroli pri la sekretoj de la domo, – **kontraŭsentis** la kuiristino.

István Nemere, or., Hungario, Nesto de Viperoj, Impeto, Moskvo, 1994, p. 22

KROM

La patrino kaj fratino povas doni al mi amon sed tamen ne **kromamaĵon**! Jes, oni iam bezonas ion ekster amo, jes ja amoron...

Mao Zifu, or., Ĉinio, La Gazeto, 100 (apr. 2002), p. 37

La aktivisto de Germana E-Asocio (GEA) Johano Pachter, private aĉetis nefunkciantan kinoteatron en Weferlingen... kun salono, koktelejo kaj multaj **kromĉambretoj**.

or., Germanio, Esperanto, 2000, 4, p. 77

Interkultura Centro Herzberg ricevis en la malnova urbodomo subtegmentan **kromĉambron** por la estonta urba E-arkivo.

La Ondo de Esperanto, 2008, 4, p. 10

Doktoro Gulopez ridis. “Mi ankoraŭ volus **kromdendi**: ĉu ekzistas inventaro de la ŝip-apoteko?”

Deck Dorval, or., Jaĥto veturas for kaj veturigas la morton, Flandra E-Ligo, Antverpeno, 1983, p. 94

Eĉ pli, mi estas ilia gasto pro la ĉerizoj kaj mia talento. Kaj la patrino **kromdiris** al mi ke mi nenion pri tio diru al la patro, ĉar li deziras ke mi tion ne scius.

Jovan Zarković, el la serba, D. Mikuličić, “O” kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 167

Do, tiu doktoro X aĉetis la dometon de maljuna sinjorino, kiu vidviniĝis kaj ne plu deziris havi tiun **kromdomon**, ŝi ja posedis domon ankaŭ en la urbo...

J.H.Rosbach, or., Norvegio, Silka kuseno, Oy Mendoservo ak, Finnlando, 1991, p. 31

La poeziiloj kiel la rimo kaj la metriko, stilize emfazante ilojn aperantaj ankaŭ en la interparoladoj, esprimas gravegan **kromenhavon**, kiun ni serioze kunmetu kun la proza enhavo en niaj teorioj.

Probal Dasgupto, or., Hindio, Literatura Foiro, 185 (jun. 2000), p. 161

Ni ne devas **kromforĝesi** gravan donitaĵon: la programo...

Marie-France Conde Rey, el la franca, Literatura Foiro, 201 (febr. 2003), p. 14

Ĝi estas sufiĉe senvalora posedaĵo: malgranda ŝtonkonstruita dometo kun griza

ardeza tegmento... al ĝi apartenis proksimume unu akreo da grundo kaj du-tri kadukaj **kromkonstruaĵoj**, kaj jen ĉio.

William Auld, el la skota, Norda Prismo, 1958, 1, p. 49

Do, ĝi konsistas el la bone konata Londona Biblio (LB), plus kelkaj **kromlibroj** kiujn la protestantoj kaj la Biblia Societo kutime malinkludas.

Sergio Pokrovskij, or., Rusio, La Ondo de Esperanto, 2008, 1, p. 20

Ŝi estas povhava virino: lia malamiko, lia **krom-memo**. Li garde, ensine malforĝe-
sas ŝin... ŝi estas la Imperiestrino... Ili komplotas pri mortigo... reciproka.

K.Jakobo, el la angla, La Gazeto, 21 (mar. 1989), p. 13

Granda malsano malhelpis lin studi, tiel ke en sia deka vivojaro li apenaŭ kapablis legi. Li tamen sukcesis **krompermesi** superi la ekzamenon pri retoriko kaj filozofio, kiam li aĝis 15 jarojn. Tiam en Francio, oni ekzamenigis samsesie en tiuj du fakoj por akiri bakalaŭron.

Literatura Foiro, 228 (aŭg. 2007), p. 180

Ne ĉiuj 600 paĝoj estas tiel kaprompaj, kredu min! Sed kiel kompreni la tuton, ne kompenante detalojn? L' aŭtoro mem avertas, ke la vortoj **kromsignifas**, kvazaŭ ĉiu kun sufikso "um" (komparu skolastikajn doktrinojn pri "analogia" (iela-tiela, uma) uzado de plusaj terminoj pri Dio!).

Kris Long, or., La Gazeto, 107 (jun. 2003), p. 23

Nun ŝi instruas matematikon en la universitato, kie ŝi doktoriĝis, **kromstudas** politikon, socion, kaj lingvojn de Suda Azio.

La Ondo de Esperanto, 2007, 12, p. 4

La ombrela asocio malavare subtenas siajn subasociojn eĉ finance. Krome ĝi ofertas plej diversajn eblojn al la subasocioj, de kunsidejoj al festosalonoj kaj **krom-subvencioj** por membrogazeto.

Patrik Austin, Riita Hämäläinen, or., La Ondo de Esperanto, 2004, 5, p. 6

La socia idearo ("filozofio", se vi volas) de Zamenhof, Lanti, Privat – por mencii nur la plej gravajn – estis **kromtuŝaĵo** de iliaj biografiaj, sed malofte objekto de apartaj studoj, kiuj klopodus ne nur sistemigi la bazajn konceptojn sed ankaŭ analizi ilin en la kunteksto de ilia tempo kaj ties ideaj fluoj.

Nikola Rašić, or., Jugoslavio, Fonto, 165 (sep. 1994), p. 11

... kaj estus tre bedaŭrinde se ili ne ĝuus tiun ĉi **kromporcion** da ripozo.

William Auld, el la angla, Eric Knight, Neniam plu lundon, Belarto, 1961, aŭtuno, p. 1

Ni elektis la vojon ĉirkaŭurban, kiu pasis tra herbejoj. Temis pri longa **kromvojo**, sed la reveninta matena suno ja spronis nin al...

Antoine Chalvin, el la sieva (kaŭkaza lingvo) al la franca, István Ertl, el la franca, La Kancerkliniko, 87 (jul.-sep. 1998), p. 7

elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

Pri la unua bulgara esperantisto Miloslav Bogdanov estis konate tute malmulte. Eĉ la mondfama “Enciklopedio de Esperanto” informas pri li per 13 linioj¹. Laŭ la Enciklopedio oni scias liajn plumnomojn kiel *Diodono* kaj *Favorgloro* (fakte tio estas E-tradukoj de liaj familinomo kaj antaŭnomo – Red.), sed ne estas konate kiam li naskiĝis. Dank’ al bulgara esploristo Canko Murgin ni scias pri Bogdanov pli multe, ol informas la arkaikiĝinta Enciklopedio². La bulgaraj ĵurnalistoj ĉiam preferis informi ke la E-gazetaro en Bulgario startis de *Rondiranto* (1901-1904), tamen oni tute ne mencias pri Bogdanova *La Mondlingvisto* (1889-1890)³. Dum multaj jaroj pri la pioniro oni menciis haste kaj sendetale. Sed ĝuste la detala retrospektivo helpas al ni prezenti fruan E-vivoparton de Bogdanov en Sofio. Ni komencu de lia naskiĝjaro.

Miloslav St. Bogdanov naskiĝis en 1868 en malgrada vilaĝo Groznatovci, kelkajn kilometrojn okcidente de urbo Trân. Post la Unua Mondmilito la vilaĝo restis sub Jugoslavio. Ankoraŭ en junaĝo Miloslav tute orfiĝis, sed li heredis de la gepatroj lernemon kaj diligintecon. En 1887 li jam redaktas gazeton *Bâlgarski Novini* (*Bulgaraj Novaĵoj*). En la gazeto estis rubriko pri lingvaj problemoj, kiu kaptis la atenton de ĝia juna redaktisto. Unue Bogdanov ellernis Volapukon, sed li komparadis ĝin kun Esperanto kaj, konkludante avantaĝon de Esperanto, plene dediĉis sin al ĝi. Necesas konsideri ke ne nur Bogdanov konvertiĝis al Esperanto. En 1888 konvertiĝis al Esperanto Nikola Zlatev, la fondinto de la Volapukista Klubo en Vेलiko Tîrnovo.

En 1888 Miloslav akiris la “Unuan Libron” de la Lingvo Internacia (por Rusoj).

En 1889 en Sofio, sub prezidado de Bogdanov aperis kaj laboris la unua en Bulgario Klubo Esperantista. Fine de 1889 la Klubo Esperantista en Sofio jam havis 125 anojn. En la sama jaro Bogdanov eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por bulgaroj.

La informo pri la Klubo Esperantista en Sofio kaj la lernolibro rapide atingis Nurenbergon, en kiu Christian Schmidt eldonis la unuan gazeton esperantistan *La Esperantisto*. Sur la paĝo de la gazeto Schmidt respondis al la unuaj bulgaraj samideanoj: “*Mi kaj miaj klubanoj tre ĝojiĝis je la sciigo, ke en Via urbo estas fondita klubo de Esperantistoj. Ni deziras al Vi plej bonan sukceson. Ankaŭ mi petas Vin alsendi plej bonece al mia klubo Vian gramatikon. Kun plej alta estimado*”⁴.

En 1889 Bogdanov emisiis gazeton *La Mondlingvisto*⁵. En decembro 1889 aperis numeroj 1 kaj 2 de la gazeto; en januaro 1890 aperis numero 3. Dank’ al *La Mondlingvisto* bulgara publiko komencis amase lerni Esperanton. Sukcesis ple-

¹ *Enciklopedio de Esperanto*, Budapeŝto, 1986, p. 57.

² *Bulgara Esperantisto*, 1976, № 1, p. 15, № 7-8, p. 6-8. (Ankaŭ: 1974, № 10-11, p. 28. – Red.)

³ Murgin C. Gazeto “La mondlingvisto” // *Bulgara Esperantisto*, 1989, № 6, p. 19-21.

⁴ *La Esperantisto*, 20.12.1889, № 3, p. 24.

⁵ *La Esperantisto*, 25.03.1890, № 6, p. 36.

jparte gimnazianoj, studentoj de la ĵus fondita Sofia Universitato, poŝtistoj, kompostistoj kaj aliaj. Por diskonigi pri Esperanto inter la bulgara popolo la gazeton Bogdanov eldonis en du lingvoj (bulgare kaj Esperante). Sur la paĝoj de la gazeto estis prezentita lernolibra kaj instrua materialoj (Plena Gramatiko kaj E-bulgara vortaro).

Sed post la 3-a numero *La Mondlingvisto* ĉesis aperadi.

En oktobro 1890 *La Esperantisto* informis ke: «*Sinjoro M.S.Bogdanov el Sofio skribas al ni, ke anstataŭ la “Mondlingvisto” li nun komencas la eldonadon de nova gazeto en nia lingvo sub titolo “Espero”*»¹. Christian Schmidt vigle reagis: “*Ni ricevis la unuan numeron de la gazeto “Espero”, kiun sinjoro M.S.Bogdanov... intencas eldonadi ĉiumonate en la lingvoj Esperanto kaj bulgara. Tion ĉi ni sciigas al ĉiuj amikoj, kiuj jam kelkajn fojojn demandis nin, kio fariĝis kun la gazeto “Espero”, kies unua numero jam longe devis eliri. Ni deziras al la gazeto plenan sukceson, ni esperas, ke la redaktoro havos sufiĉe da energio por akurate eldonadi la gazeton malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj kaj grandaj materialaj perdoj, aparte en la unua tempo. Sed kun pli detala priparolado ni nin detenas ankoraŭ ĝis la tempo, kiam ni vidos, ke la gazeto efektive eliradas regule*”².

Por informi pri Esperanto eldonadon de la gazeto en du lingvoj Bogdanov opiniis ne sufiĉa kaj prenis plumon mem. En 1893 en bulgara ĉiumonata ĵurnalo *Svjet (La Mondo)* aperis liaj artikoloj pri Esperanto (№№ IV, IX-X)³. En komenco de 1894 en la numero XI de la ĵurnalo *Svjet* kiel daŭrigo aperis artikolo pri Esperanto kaj anonco pri intencata eldonado de tute nova ĵurnalo *Zvezda (Stelo)*⁴. Samjare Bogdanov eldonis broŝureton sub titolo “Vsemirno Meĉtanie i Bulgarskata Pravopisna Revolucija (La universala revo kaj bulgara ortografia revolucio)”. La broŝureto estis represo de lia artikolo, kiu estis publikigita en la ĵurnalo *Svjet*.

En la numero XII de *Svjet* aperis daŭrigo de la artikolo verkita de Bogdanov pri Esperanto. Krom la ĵurnalo *Svjet* li publikigis pri Esperanto en la numero 9 de ĵurnalo *Glas Makedonski (Voĉo de Makedonio)*⁵.

Krom la informado pri Esperanto Bogdanov ankaŭ helpis al la Nurenberga *Esperantisto* per mono kaj informoj. Ekzemple, li sendis artikoleton pri la unua bulgara ĵurnalisto kaj verkisto K.Fotinof. En la artikolo temis, ke bulgaraj ĵurnalistoj kaj verkistoj decidis prepari kaj eldoni histori-literaturan kolekton dediĉitan al Fotinof⁶.

Meze de 1894 Bogdanov decidis eldonadi novan ĵurnalon sub titolo *Internaciisto* kondiĉe ke la esperantistoj mendas almenaŭ 500 ekzemplerojn kaj sendos al li interesajn informojn⁷. Evidente li ne sukcesis kolekti bezonatan kvanton da abonoj, pro tio la sekvo ne okazis.

¹ *La Esperantisto*, Oktobro 1890, № 10, p. 51.

² *La Esperantisto*, Junio 1891, № 6, p. 47.

³ *Esperantisto*, 15.01.1894, № 1 (49), p. 11.

⁴ *Esperantisto*, 15.02.1894, № 2 (50), p. 23.

⁵ *Esperantisto*, 15.04.1894, № 4 (52), p. 53.

⁶ *Esperantisto*, 15.05.1894, № 5-6 (53-54), p. 90.

⁷ *Esperantisto*, 15.07.1894, № 7 (55), p. 104.

La 8-an (20-an) de septembro 1894 Bogdanov sendis gratulan telegramon en Esperanto al princo de Bulgario Ferdinando I. La duan telegramon li sendis la 14-an (26-an) de februaro 1895 okaze de naskiĝtago de la princo Ferdinando la 1-a. En la telegramo estis interesaj por ni detaloj: “... *Pro okazo de Via tago de naskiĝo en nomo de ĉiuj esperantistoj mi alportas miajn plej korajn kaj fidelajn gratulojn kaj esprimas plej grandan malestimon al la Stoilova registaro – pli terura ol Stambolova...*”¹

Tamen kio okazis en 1894? Kial Bogdanov esprimas grandan malestimon al la Stoilova registaro? En la sama jaro Bogdanov partoprenis ribelon en Sofio, kiu renversis diktatorecan reĝimon de Stefan Stambolov. En la batalo kontraŭ polico Bogdanov estis kruele batita, kaj liaj amikoj portis lin, makulitan de propra sango, al lia loĝejo. El tiu fakto ni konkludas ke la renversitan reĝimon de Stambolov okupis pli terura Stoilova reĝimo.

Malgraŭ ke en 1903 Bogdanov estis eksigita el Klubo Esperantista en Sofio (fondita de li en 1889 kaj restarigita de li en 1902), li ne ĉesis sian agadon por Esperanto. Li restis fidela al Esperanto ĝis sia morto, okazinta en 1914.

Daŭrigante la titolon de la artikolo ni povas diri ke doktoro de juro Miloslav Bogdanov estis: la unua bulgara esperantisto (ekde 1888), fondinto de la unua Klubo Esperantista en Sofio (1889) kaj ties unua prezadanto (1889-1903); la unua kompilinto de E-lernolibroj por bulgaroj (1889, 1990); la unua redaktoro de du E-periodaĵoj aperintaj en Bulgario: *La Mondlingvisto* (la dua en la E-mondo, 1889-1890) kaj *La Espero* (1891); la unua E-jurnalisto kaj publicisto (1888-1895), la unua informanto pri novaĵoj en Bulgario sur la paĝoj de *Esperantisto* (1894).

E-historiisto Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburg)

SUNO, MARO, KONCERTOJ KAJ NOKTA VIVO

Se vi enuas pri tio, vi povas aŭskulti klerajn prelegojn pri Esperanto, ĝia interna ideo kaj ĝia akuzativo. En Castellaro (Katelaro) apud San Remo (Sanremo) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2013 okazos la 80-a Itala Esperanto-Kongreso. Se vi jam partoprenis la italan kongreson de la lastaj jaroj, vi scias pri kio temas. Se vi ne partoprenis, pensu pri io meze inter la kleriga parto de UK kaj ties ekskursoj (sed tre pli malmultekostaj), meksika festo, feriaj kluboj ĉe Mediteraneo kaj festivalo de Esperanto-muziko kun rimarkinda junulara partopreno kaj etoso.

Ĝi okazos en Kastelaro, apuda urbeto de Sanremo, preskaŭ ĉe la landlimo inter Italujo kaj Francujo, en la konata Lazura Marbordo.

Bonvolu legi en <<http://kongreso.esperanto.it/80/?lang=eo>> nian inviton al vi, detalojn pri la aliĝo kaj aliĝkotizoj, loĝado kaj loĝkostoj. Kontaktadreso <kongreso@esperanto.it>.

Informitale

¹ *Esperantisto*, 15.04.1895, № 4 (64), p. 54.

Bulteno de REU

№73. Kompilas kaj redaktas Grigorij Arosev (rete: arosev@gmail.com), redaktofino – 24.12.2012

LA DOLORAJ FORPASOJ

Ene de kvardek tagoj la rusia Esperanto-movado suferis tri dolorajn perdojn. La 14-an de oktobro mortis Aleksandr Titajev, fondinto kaj plurjara gvidanto de vladivostoka E-klubo “Oriento”. La 16-an de novembro lin sekvis Anatolij Sur-nakin, multjara aktivulo, individua membro de REU. La 24-an de novembro for-pasis Aleksandr Ŝevĉenko, unu el la plej gravaj nuntempaj esperantistoj de Rusio, fondinto kaj motoro de la eldonejo “Impeto”.

Ni funebras kaj kondolencas la parencojn kaj proksimulojn.

La Estraro de REU

ELEKTO DE KOMITATANOJ B POR 2013-2016

En 2013 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2013-2016. Parto de ĝi estos la elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Se je la 31-a de decembro 2012 la nombro de IM estos minimume 5001, oni elektos ses komitatanojn B; se la nombro estos malpli granda, oni elektos kvin.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) preskribas: *Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj mem-broj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ ties biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.*

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando) ĝis la 28-a de februaro 2013. Validos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj.

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 2011 kaj 2012) kaj resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon en la periodo 2007-2012, ne estas reelektebla.

Se la nombro de la kandidatoj ne superos tiun de la elektotaj komitatanoj B, ĉiuj kandidatoj estos konsiderataj kiel elektitaj. Se la nombro de la kandidatoj estos pli granda, la individuaj membroj elektos siajn reprezentantojn per poŝta balotado.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, <direktoro@co.uea.org>

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Nova dumviva membro de REU fariĝis Anton Gerŝman (Moskvo). Elkoran dankon al li pro la subteno de la Unio.

NOMBRADO DE ESPERANTISTOJ FIASKIS

Nombrado de esperantistoj, lanĉita en Interreto, prognozeble montris magrajn rezultojn – je la 22-a de decembro 2012 nur 2226 esperantistoj subskribis la peticion (kaj per tio nombriĝis). Kompare en 2012 UEA havis ĉ.5000 membroj.

Evidente ne multaj esperantistoj taksis la aferon partopreninda, kvankam inter la lasta deko de subskribintoj estas reprezentantoj de variaj landoj kaj kontinentoj (Brazilo, Mongolio, Rumanio ktp).

Grigorij Arosev

VETERANOJ EN FACEBOOK

En la ĵusa Zamenhof-Tago al la Esperanto-organizaĵoj en Facebook aldoniĝis ankaŭ Veterana Esperantista Klubo (VEK). De multaj jaroj ĝia aktiveco limiĝis al neregulaj kunsidoj en Universalaj Kongresoj, sed nun Facebook donas la eblon de konstanta komunikiĝo inter tiuj veteranoj, kiuj ĉeestas tiun socian retejon.

VEK estas klubo por esperantistoj, kiuj lernis la lingvon antaŭ minimume 40 jaroj. Aliĝpeton oni povas sendi rete al <vek@co.uea.org> aŭ paperpoŝte al la Centra Oficejo de UEA, kun mallonga priskribo pri sia esperantistiĝo aŭ eĉ pli ampleksa rakonto pri sia esperantista agado. Membreco estas senpaga, sed oni povas pagi libervolan kotizon al la UEA-konto de VEK (vekk-k). La kotizo egalas al tiu de Membro kun Gvidlibro de UEA laŭ la tarifo por la koncerna lando.

Ankaŭ al la Facebook-grupo de VEK rajtas aliĝi esperantistoj, kiuj lernis la lingvon antaŭ 40 jaroj aŭ pli. La grupo estas fermita, t.e. nur la membroj povas afiŝi kaj legi mesaĝojn en ĝi.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

REU-kotizoj por 2013

– mecenata kotizo: 500 rubloj

Inkluzivas ĉion de la individua kotizo (vd.sube), sed sur la membrokarto estos skribita “Mecenato de REU”.

– individua kotizo, pagata ĝis la 28-a de februaro 2013: 200 rubloj (por eksterKSŜanoj – 20 eŭroj).

– individua kotizo ekde la 1-a de marto 2013: 250 rubloj (por eksterKSŜanoj – 25 eŭroj).

Inkluzivas membrokarton, Bultenon de REU en elektronika formo (laŭpete – ankaŭ en la papera) kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton dum Konferencoj de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. La individua kotizo validas por la kalendara jaro 2013.

NB! Pagante la jarkotizon antaŭ la 28-a de februaro vi ne nur helpas REU, sed ankaŭ ŝparas iom da propra mono. Se oni pagas la kotizon ne persone al la kasisto, la dato de la pago estas kontrolata laŭ la poŝtkvitanco. Nepre gardu la poŝtkvitancan ĝis vi informiĝos, ke via kotizo atingis nin!

– dumviva kotizo: 5000 rubloj (por eksterKSŜanoj – 500 eŭroj)

Inkluzivas ĉion de la individua kotizo dum la tuta vivo de la membro.

– **familia kotizo: 100 rubloj**

Inkluzivas membrokarton, voĉdonrajton dum REU-Konferencoj, rabatojn en E-aranĝoj de REU. Je familia kotizo rajtas parencoj de individuaj, dumvivaj aŭ mecenataj membroj, kiuj loĝas ĉe la sama adreso.

– **kolektiva kotizo: 70 rubloj por ĉiu aligita membro (aligintaj kolektivoj pagas minimume por 5 membroj).**

*Inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por kluboj kun 10-15 aligitaj membroj (kaj por ĉiu aldona deko de aligitaj membroj), aliajn informojn de REU por la kolektivo; membrokartojn, voĉdonrajtojn en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. **Se klubo pagas por malpli ol 10 membroj, ĝi devas aparte aboni REGon.***

– **aliĝkotizo por novaj aŭ realiĝintaj kluboj – 300 rubloj.**

Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

Pagmanieroj

1. Poŝta ĝiro: 142717 Московская область, Ленинский район, п/о Развилка, до востребования, Наталье Николаевне Шороховой

2. En Yandex-Dengi oni povas pagi al la monujo 41001612527392

3. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas **persono en Moskvo.**

4. Tra Sberbank.

– Se vi havas propran bankan karton, emisiitan de Sberbank, vi povas ĝiri la monon rekte tra bankmaŝino (банкомат). Tiucele enigu karton, entajpu vian identigan kodon, kaj poste elektu en la menuo: "**Перевод средств**". Entajpu numeron de la karto: 6761 9600 0497 614843 kaj necesan sumon.

– Se vi ne havas karton aŭ aŭtomata ĝiro ne sukcesis, vizitu bankon kaj transpagu la monon, uzante ĉi-subajn datumojn:

Банк получателя: ОАО "Сбербанк России"

БИК 044525225, ИНН 7707083893, КПП 775003035, ОКАТО 45286580000, ДО № 0135, 121069, Москва, Поварская улица, 31/29.

Получатель: Шорохова Наталья Николаевна

Номер счёта получателя: 40817 81003 82604 04119, код подразделения 9038/00135

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro vi devas retroŝte aŭ telefone informi nin pri via pago (pere de la adreso **membreco@reu.ru** aŭ numeroj de estraranoj). Vi devas informi pri la ĝirita sumo kaj la nomo(j) de persono(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!

Eksciu, ke...

ALEKSANDR BORISOVIČ ŠEVČENKO (13.09.1957-24.11.2012)

Forpasis Saša Ševčenko. Sekaj faktoj de la biografio (naskiĝis, esperantiĝis, aktivis en Moskva Centra E-klubo, estis redaktoro, vicprezidanto de REU, fondis eldonejon...) ne povas transdoni la esencon de tiu Homo kaj signifon de lia kontribuo al E-kulturo. Ĉiam bon-

humora, modesta, verve ŝatanta sian laboron, ĝisosta esperantisto, profunda sciinto de pluraj faktoj el la historio de la lingvo kaj la movado, Saša por longe restos en nia memoro. Ne eblas supertaksi valoron de lia agado por E-kulturo ĝenerale kaj des pli – por la rusia E-kulturo. Multnombraj libroj, kiujn li redaktis, kompilis kaj eldonis, staros sur niaj bre-



toj dum almenaŭ unu rusia esperantisto havos bezonon preni en la manojn presitan E-tekston. Mi eĉ ne povas imagi, kiel (magre) aspektus la rusia E-literaturo dum lastaj 20 jaroj, se iam Saša kaj Lena ne fondus la eldonejon “Impeto”. Per sia eldona kaj redakta laboro la geedzoj ankaŭ fiksas altan nivelon por E-libroj, al kiu devos orientiĝi ĉiuj E-eldonaĵoj en nia lando, inkluzive la restintan teamon (Lena, Dima, Anja) de “Impeto”. Dankon, Saša!

Garik Kokolija (Moskvo)

ALEKSANDR BORISOVIČ TITAJEV

La 14-an de oktobro en Vladivostok post longa malsano mortis Aleksandr Titajev. Dum kelkdek jaroj li estis la plej fervora aktivulo de la E-movado en Fora Oriento. La perdo por la tutrusia movado estas vere grandega.

Aleksandr Borisovič Titajev naskiĝis 09.01.1951 en Vladivostok. Li finis elektroteknikan fakultaton de For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato. En 1979 li iĝis kandidato de teknikaj sciencoj.

En 1980 li kune kun samideanoj fondis en Vladivostoko Vladivostokan Esperanto-klubon. Ekde 1987 – konstanta prezidanto de Ĉemaruja Esperanto-klubo “Pacifiko”, kiu en 1997 ricevis statuson de Unesko-klubo.

Krom instruista agado li estris fakon de internaciaj rilatoj en la universitato, kie en 2005 estis eldonita lia libro “Osnovi interlingvistiki i esperantologii” (Fundamento de interlingvistiko kaj esperantologio).

Li estis ano de scienca konsilio de Societo de Esploristoj de Amura Regiono (OIAK), kie li okupiĝis pri esploro de Esperanto-movado en Fora Oriento. En 2012 estis medalita pro aktiva socia kaj kleriga agado.



POŝTMARKO PRI LA UNUA LIBRO

Por omaĝi la 125-an datrevenon de la lingvo Esperanto, UEA jam duan fojon mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL porokazan poŝtmarkon. En aprilo aperis poŝtmarko kun la simbolo de la jubilea jaro. La nova poŝtmarko montras la kovrilon de la Unua Libro, kun la nederlandlingva teksto *Eerste leerboek Esperanto 1887-2012* (La unua lernolibro de Esperanto 1887-2012). Ĝi validas por afranki normalan unuaklasan enlandan leteron.



La poŝtmarko estas vendata en blokoj po 10 markoj. Unu bloko kostas 6,00 eŭrojn (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla). Oni povas mendi ĝin ĉe la Libroservo de UEA, kaj kompreneble ĝi estis vendata ankaŭ dum la Malferma Tago de la Centra Oficejo, sabaton, la 24-an de novembro.

La poŝtmarko pri la Unua Libro estas jam la sesa laŭ mendo de UEA. La antaŭaj markoj ricevis multe da publikeco en nederlandaj filatelaj revuoj, kaj la nova marko sendube spertos la samon. La temoj de la unuaj du markoj, aperintaj en 2008, estis la 93-a UK en Roterdamo kaj la 100-a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas jam elĉerpitaj, sed plu haveblas la poŝtmarkoj pri la 150-a datreveno de L.L.Zamenhof kaj la 100-a datreveno de Ivo Lapenna, eldonitaj en 2009.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

MOVADA KAJ LITERATURA MALFERMA TAGO

80 vizitantoj el 13 landoj ĉeestis la 37-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA la 24-an de novembro. Ĝia gastpreleganto estis prof. Humphrey Tonkin, kies du prelegoj prezentis du dimensiojn de lia Esperanto-agado. Sub la temo *125 jaroj: Esperanto tiam kaj nun* la movada aktivulo Tonkin dediĉis la unuan prelegon al la jubileo de Esperanto, traktante precipe la aktualajn defiojn an-



taŭ UEA. En sia alia prelego, *Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo*, la literaturisto Tonkin parolis pri la nocio ke nia literaturo estas en si mem tradukita literaturo, ĉar ĉiu literatura verko en Esperanto estas iasence manifestiĝo de la kultura

kaj lingva fono de la verkinto.

Tonkin ankaŭ prezentis la libron *Pri homoj kaj verkoj* kune kun ĝia alia redaktoro Michela Lipari. La libro, lanĉita en la Hanoja UK, estas kolekto de literaturaj eseoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA, kies prezidanto kaj respektive sekretario Tonkin kaj Lipari estas. Ionel Oneț prezentis la ĝeneralan rikolton de novaĵoj aperintaj post la antaŭa Malferma Tago. Apartan prezenton pri polaj eldonaĵoj faris Barbara Pietrzak, interalie lanĉante la pollingvan verkon *Ludwik Zamenhof* de Walter Źelazny.

Krome la programo konsistis el Esperanto-filmoj kaj ĝi finiĝis, jam tradicie, per programero, dum kiu la ĉeestantaj estraranoj de UEA, ĉi-foje Claude Nourmont, Barbara Pietrzak kaj Loes Demmendaal, respondis demandojn de la publiko. Tra la tuta tago estis vigle vizitata la libroservo. La plej furora varo, kun 22 venditaj ekzempleroj, estis la folio kun la nova poŝtmarko pri la Unua Libro, dum la plej populara libro estis *Pri homoj kaj verkoj*, kiun aĉetis 13 vizitantoj. Kun 8 ekzempleroj bone vendiĝis ankaŭ alia novaĵo, la 800-paĝa *Bildvortaro* de Petro Desmet kaj Jozefo Horvath. La vendoj sumiĝis entute je 1912 eŭroj.

La prelegoj de Humphrey Tonkin estas aŭskulteblaj kaj legeblaj en la sekcio “Liberaj studoj” de <edukado.net>.

La Malferma Tago okazos denove la 27-an de aprilo 2013.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

LA REJKJAVIKA UK DISKUTOS PRI JUSTA KOMUNIKADO

Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj estos la temo de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko (20-27 julio 2013) laŭ la decido de la Estraro de UEA. La Estraro ankoraŭ elektos reĝisoron de la temo por plani kaj gvidi ĝian traktadon.

Laŭ la estrarano pri kongresoj Claude Nourmont, la elekto ne estis tute facila. *Farante la decidon, la Estraro eliris el du premisoj. Unue, oni kutime celas rilatigi la temon al la speciala jara temo de UN kaj Unesko, se ĝi tuŝas la agadkampon de UEA. Por 2013 taŭga jara temo mankas, sed plu daŭras la Dua Internacia Jardeko*

pri la Indiĝenaj Popoloj (2005-2015). Alia premiso estis la speciala lingva kaj kultura situacio de Islando, daŭrigas Nourmont kaj memorigas, ke la malmultnombra islanda popolo sukcesis tra jarcentoj konservi siajn lingvon kaj kulturon. La insuleco de Islando ne klarigas ĉion; Islando ja sendependiĝis relative malfrue. Laŭ Nourmont insuloj ne estas tiel izolitaj, kiel oni supozus. Ili vivas per komunikado kaj per interŝanĝoj, ekonomie kaj kulture. Ŝipoj ekzistas de praa epoko, ne nur por vikinge konkeri, sed ankaŭ por liveri kaj interŝanĝi varojn, materiajn kaj nemateriajn.



Por la traktado de la temo Claude Nourmont sugestas, ke “insulo” estu komprenata ankaŭ metafore: *Ĉu ni, esperantistoj, estas insuleto de strebado al justa komunikado meze de la oceano de maljusta komunikado?*

La komunikadon oni konceptu vaste, kun precipa atento al Interreto, pri kiu Nourmont demandas: *Ĉu ĝi ebligas pli justan komunikadon inter lingvokomunumoj? Ĉu ekzemple la fakto, ke Google aldonis Esperanton inter siaj traduklingvoj, progresigas justan komunikadon?* Dum la estrara diskuto pri la elekto de la temo, la estrarano pri scienca kaj faka agado Amri Wandel emfazis, ke por esperantistoj tiu ĉi aspekto estas aparte aktuala pro la atingo ĉe Google. Laŭ Wandel, la signifo de tiu atingo estas komparebla nur kun la Montevidea rezolucio de Unesko. Kongresaj temoj de antaŭaj UK-oj: <uea.org/kongresoj/uk_temoj.html>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA INTERVENIS EN ESPERANTO ĈE UN EN ĜENEVO

La 27-an kaj 28-an de novembro okazis la 5-a Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la Ĝeneva oficejo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia temo estis la plenumado de la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj, adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 18-an de decembro 1992. Kiel reprezentantoj de UEA, Cesco Reale kaj Stefano Keller alparolis la Forumon ĉe la tagordero pri malfacilaĵoj spertitaj en la praktikado de la rajtoj difinitaj en la Deklaracio.

Laŭ la regularo de UN en kunsido licas paroli, krom en iu el la ses oficialaj lingvoj de UN, ankaŭ en iu alia lingvo, kondiĉe ke tion akompanu interpretado en unu el la oficialaj lingvoj fare de la intervenantoj. Tia interveno okazis en la 2-a Forumo en 2009, al kiu la ĉefreprezentanto de UEA Stefano Keller invitis reprezentantinon de la Svisa Federacio de Surduloj, kiu faris sian intervenon gestolingve, kun akompana voĉa interpretado al la franca.

La alparolo de UEA en la 5-a Forumo okazis en Esperanto: Stefano Keller legis kaj Cesco Reale interpretis hispanen, alineon post alineo. UEA atentigis pri la daŭra lingva diskriminacio ĉe laborpostenaj ofertoj, kiu hodiaŭ estas ankoraŭ



Cesco Reale (dekstre) kaj Stefano Keller intervenas nome de UEA

lingva interveno de UEA ĉe UN, supozas Stefano Keller, kiu estas ankaŭ la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj.

La evento donis okazon al la komisiitoj de UEA rekontakti malnovajn konatojn el aliaj NRO-oj kaj ekhavi novajn kontaktojn. Okazis ankaŭ laborkunsido de la tuta kvinmembra teamo de UEA por pritrakti la ĝisnunan kaj plani la estontan agadon de UEA ĉe la Ĝeneva UN-sidejo. Teksto kaj sonregistraĵo de la interveno de UEA: <<http://www.lingvaj-rajtoj.org/eventoj>>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

PRI ESPERANTO EN LA NRO-PACKOMITATO EN VIENO

Esperanto estis prezentita la 28-an de novembro en kunveno de la Packomitato de Neregistaraj Organizaĵoj ĉe la Viena sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. La kunvenon prezidis d-ro Hans Michael Maitzen, la ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Vieno. Ĉeestis reprezentantoj de dek du membro-organizaĵoj de la Packomitato. Mag. Bernhard Tuider, kiu estas alia reprezentanto de UEA en Vieno apud d-ro Maitzen, prelegis pri la 125-jara movado por la disvastigo de Esperanto.

En sia referaĵo Tuider reliefigis la koherecon de la paca idealo de la Esperantomovado kun tiu de la porpacaj grupoj kaj movadoj burĝonintaj antaŭ la Unua Mondmilito. Li precipe elstarigis la kontribuon de la aŭstraj nobelpremiitoj Bertha von Suttner kaj ŝia posteulo-asistanto Alfred Hermann Fried.

Montriĝis, ke Bernhard Tuider tiel bone prezentis siajn tezojn, ke poste dum sufiĉe longa tempo la ĉeestantoj estis spronitaj diskuti pri la temo kun li kaj ankaŭ kun mi, rakontas d-ro Maitzen, daŭrigante: Mi persone aprezas tiun kunvenon kiel tre bonan kontribuon de nia UN-representantaro al la jubileo de la 125-jariĝo de Esperanto.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

ESPERANTO-PONTO EN BYDGOSZCZ

Okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto la 3-an de oktobro 2012 Konsilio de Urbo Bydgoszcz decidis honorigi la gravan datrevenon nomante ponto-konstruaĵon trans la rivero Brda en Bydgoszcz “Most ESPERANTO”. La 27-an de oktobro 2012 okazis oficiala malkovro de du tabuloj kun surskribo “Most ESPERANTO” (Ponto ESPERANTO) je ambaŭ flankoj ĉe la rivero Brda en Bydgoszcz. La ceremonion gvidis en Esperanto kaj la pola lingvo Lech Zagloba – Prezidanto de la Urba Komisiono pri Kulturo kaj Edukado, ĉar li mem estas esperantisto de pli ol 40 jaroj. Festparolis Stefan Pastuszewski – Prezidanto de Komisiono pri Stratnomoj en la Urbo Bydgoszcz, kiu substrekis, ke Ponto de Esperanto estas ankaŭ Ponto de interkompreniĝo inter homoj de diversaj nacioj, lingvoj kaj kulturoj, kaj dankis al Esperanto-organizaĵoj en Bydgoszcz pri ilia aktiva promocio de la urbo Bydgoszcz en 125 landoj de la mondo. La ceremonion partoprenis kelkdek personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Kazahio, Rusio kaj Senegalio. Pola Televido (TVP) – Filio en Bydgoszcz en regiona tagraporto “Zblizenia/Proksimigoj” dum pli ol 2 min. raportis pri la evento.

Klubo Esperanta Amiko en Bydgoszcz

LINGVA FESTIVALO EN ODESSA

La 10-11-an de novembro en Odessa okazis vica, jam la sesa Lingva Festivalo “Ĉielarko de lingvoj”. Kiel ĉiam, ĝia iniciatinto estis Odesa junulara Esperanto-klubo “Verdaĵo”. La celo de la Festivalo estis prezenti *samvalorecon* de ĉiuj lingvoj de la mondo, montri ilian vastan buntan diversecon, dum ĉiu estas siaspece eminenta kaj esprimas neforigeblan parton de la komuna spirita riĉeco de la homaro.

Ĉi-jare nia “lingva ĉielarko” estis aparte multkolora. Estis prezentitaj la lingvoj: belorusa, bulgara, cigana, ĉeĥa, ĉuvaŝa, daria, Esperanto, franca, gagaŭza, germana, greka, hebrea, hinda, hispana, hungara, itala, japana, kartvela, korea, latina, latva, moldava, nederlanda, okcitana, persa, puŝtua, rusa, serbokroata, slovaka, turka, turkmena. Ĉiuj lingvoj (krom Esperanto kaj la latina) estis prezentitaj de iliaj naturaj portantoj. Finiĝis la tago per koncerto de nia fama kaj amata JoMo – Jean-Marc Leclercq, kiu speciale venis el Francio por partopreni du LF: en Odessa kaj en Jalta.



La Festivalo daŭris du tagojn. En la dua tago, dimanĉe, okazis konkursoj de poliglotoj de lernejoj kaj studentaj teamoj. Partoprenis 5 studentaj kaj 9 lernejoj teamoj. La premiojn por la prezentantoj kaj por venkintoj de poliglotaj konkursoj disponigis Departamento de kulturo kaj turismo de Odessa regiona ŝtata administracio. La sekva Lingva Festivalo en Odessa estas planata por 2014.

Tatjana Auderskaja (Odessa)

De la 12-a ĝis la 14-a de decembro kunvenis en Parizo la Internacia Konferenco de la Neregistaraj Organizaĵoj havantaj oficialajn rilatojn kun Unesko. El 371 organizaĵoj 110 aliĝis al la konferenco, sed reale ĉeestis 97. Pluraj delegitoj ne povis veni, ĉar ili ne ricevis vizojn ĝustatempe. Nome de UEA, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unesko jam ekde 1954, partoprenis Renée Triolle kaj Barbara Despiney, la konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe Unesko. La konferenca temo estis *Kulturo kaj kulturoj: rekunigi universalecon kaj diversecon*, pri kiu enkonduke parolis franclingva kongolanda verkisto Alain Mabanckou. Li emfazis, ke Afriko, ekzemple, ne estas io unueca kaj ke afrikanoj ekster Afriko kreas aliajn Afrikojn kaj afrikajn kulturojn.

La temo estis traktata en atelieroj. En tiu pri “Kulturo kaj edukado” prelegis



Renée Triolle (maldekstre) kaj Barbara Despiney kun Patrick Gallaud, la nova prezidanto de la Internacia Konferenco de NRO-oj.

Catherine Deremble, kiu gvidas la Unesko-komisionon pri interkultura dialogo por paco. Laŭ ŝi, pro la multaj devenoj de la eŭropaj lernejoj, la edukado devas garantii la transdonon de ĉies origina kulturo. Al ŝia eldiro, ke dononte al la gejunuloj la necesajn ilojn por, inter alie, kulturaj interŝanĝoj, “necesas konsideri, ke la angla estas necesa en tiu perspektivo”, Triolle rebatis, demandante, kiel konservi la kulturan diversecon, se jam 95% de la monda kulturo ŝajnas esti

anglalingva, kaj la lokajn sciojn, se estos nur unu maniero pensi.

En la labora parto oni elektis la prezidanton de la Internacia Konferenco por du-jara periodo. El kvar kandidatoj elektigis Patrick Gallaud, kiu vizitis la 87-an UK en Fortaleza en 2002. Oni elektis ankaŭ la membrojn de la Ligokomitato, kiu kunordigas la kunlaboron de NRO-oj kaj iliajn rilatojn kun la organoj de Unesko.

Krom ĉeesti la kunsidojn kaj plurfoje interveni en la diskutoj, la reprezentantoj de UEA aranĝis ankaŭ ekspozicion pri Esperanto. Por ke la delegitoj povu pli bone konatiĝi kun la aliaj NRO-oj kaj iliaj agadoj, la konferenca programo enhavis duhoran “liberspacan sesion”, dum kiu ĉiu rajtis starigi ekspozicion.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Akademiano **Li Shijun** (Ĉinio), konata laŭ plumnomo **Laŭlum**, forpasis la 10-an de novembro en Pekino. Li naskiĝis en 1923 kaj eklernis Esperanton en 1939. En 1950 li kunpreparis la fondon de Ĉina Esperanto-Ligo kaj ekpartoprenis en la redaktado de la monata gazeto *El Popola Ĉinio*, por kiu li longtempe servis i.a. kiel vicĉefredaktoro kaj tradukanto. Li estis ankaŭ vicĉefredaktoro de Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj de *La Mondo*, la organo de ĈEL.

Laŭlum faris kvante kaj kvalite elstaran kontribuon al la traduka literaturo de Esperanto. Li tradukis i.a. la verkojn *La okcidenta ĉambro* de Zengling Hong (1961), *Sinjoro Dongguo* de Dong Gjuhian (1962), *Aŝma* (1980), *Aŭtuno en la printempo* de Ba Jin (1980), *Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang* de Chi Li (1985), *Qu Yuan* de Guo Moruo (1987), *Frosta nokto* de Ba Jin (1990), *Ĉinaj klasikaj poemoj ilustritaj* (1990), *Mirrakontoj de Liaozhai* de Pu Songling (1994), *Ĉe akvorando* (2004), *Noktomezo* de Mao Dun (2004), *Romano pri la tri regnoj* de Luo Guanzhong (2008), *Pilgrimo al la Okcidento* de Wu Chengen (2009) kaj *Kvar generacioj sub la sama tegmento* de Lao She (2011). Li kuntradukis kaj poluris la trivoluman *Ĉina antologio* (1959, 1986, 1989) kaj multajn aliajn verkojn. Li mem aŭtoris i.a. *222 simplaj versaĵoj por komencantoj* (1995), poemojn, artikolojn, eseojn kaj recenzojn. Laŭlum verkis ankaŭ lernilojn, i.a. *Nova vortaro Esperanto-ĉina* (kun aliaj, 1959), *Esperanta konversacio* (1964), *Unua ŝtupo de Esperanto* (1983), *Esperanto-kurso por memlernado* (1984), *Nova kurso de Esperanto* (1986), *Esperanto-Ĉina Vortaro* (kun aliaj, 1990) kaj *Gvidlibro de Esperanta konversacio* (2001).



Laŭlum estis membro de la Ŝtata Komisiono por Juĝo pri Kompetenteco de Superaj Tradukistoj. Ekde 1990 li ĝuis ŝtatan subvencion pro sia kontribuo al ĵurnalismo. Li estis estro de Ĉina Esperanto-Instituto kaj, ekde 1983, membro de la Akademio de Esperanto. Li estis elektita kiel Honora Membro de UEA en la 89-a UK en Pekino, en kiu li ankaŭ gvidis kiel rektoro la Internacian Kongresan Universitaton. En 2010 la Ĉina Tradukista Asocio honoris lin per Dumviva Honora Premio pri Tradukado.

Gazetaraj Komunikoj de UEA



FORPASIS DAO ANH KHA (1923-2012)

La eminenta vjetnama esperantisto Dao Anh Kha forpasis la 6-an de decembro en Hanojo. Li naskiĝis en la Zamenhof-tago, la 15-an de decembro 1923, kaj esperantistiĝis en 1947. En 1956 li estis kunfondinto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA), kies ĝenerala sekretario li estis ĝis 1990. En 1995 VPEA ŝanĝis sian nomon al Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) kaj elektis lin honora prezidanto. Ekde 1999 li funkciis ankaŭ kiel konsilanto de VEA pri trejnado de junaj aktivuloj. Laŭ lia iniciato la 2-a Azia Kongreso de Esperanto okazis en Hanojo en 1999.

Ekde 1956 Dao Anh Kha gvidis centojn da ĉiugradaj Esperanto-kursoj. Li estis redaktoro de la bulteno *Informado el Vjetnamio* de 1956 ĝis 1975. En 1957 aperis la duvoluma *Memlernolibro de Esperanto*, verkita de li kun Nguyen Hai Trung. Li estis fekunda tradukisto el kaj al la vjetnama lingvo. Inter liaj esperantigoj elstaras *Elektitaj poemoj* de To Huu (1962), elektitaj pecoj el *Uc Trai kaj Quoc Am Poemaroj* de Nguyen Trai (1962), ankaŭ *Tagkajero en prizono* (1964) kaj *Versaĵoj kaj prozo* (1980) de Ho Chi Minh. Al la vjetnama li tradukis i.a. verkojn de Ŝekspiro, kaj lia traduko de *Hamleto* estis plurfoje reeldonita. Li verkis poezion ankaŭ originale en Esperanto, kaj artikolojn kaj eseojn pri literaturaj kaj movadaj temoj. Ekde 1999 li estis ĉefredaktoro de la kolektiva verko *Vortaro de komparaj proverboj vjetnama-angla-franca-Esperanto*.

En 2001 Dao Anh Kha estis elektita kiel Honora Membro de UEA, kaj en 2004 li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

LA 7-A AZIA KONGRESO DE ESPERANTO...

... okazos en Jerusalemo, la 18-an – 22-an de aprilo 2013, koincide kun la 14-a Israela Kongreso. Kvintaga Esperanto-festeno kun riĉa soci-kultura programo kaj multaj ekskursoj en Jerusalemo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kiu dum tiu sezono havas perfekte agrablan veteron. Temo – “Ekologio de paco – paca kunvivado de homo, medio kaj naturo”. Distra programo – Kajto kaj JoMo. Pliaj informoj kaj aliĝo: <www.esperanto.org.il>.

LA 46-A KONFERENCO DE ILEI...

... okazos de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2013 en Germanio, Esperanto-urbo Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo) en idilie bela valo de la Harz-montaro. Konferenca temo: “La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas”. Kul-

turaj kaj klerigaj ofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa programo “Dumviva Lernado”, el kiu ankaŭ Esperanto-projektoj ricevas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj, ktp.?

LIBROJ DE “IMPETO” FAVORPREZE PROKSIME DE KREMLO

La eldonejo «Impeto» preparis novjaran donacon por esperantistoj. La librojn de la eldonejo jam dum pli ol dek jaroj oni povas trovi en la plej popularaj librovendejoj de Moskvo kaj Sankt-Peterburg. Nun moskvanoj kaj gastoj de la ĉefurbo povas aĉeti Esperanto-literaturon en la nova malgranda kaj komforta librovendejeto «Ĥodaseviĉ» laŭ relative malaltaj prezoj! La vendejo situas en la centro de Moskvo, en promendistanco de Kremlo kaj metrostacio “Kitaj-gorod”, laŭ la adreso: Pokrovka, 6. Eniru la arkon kun la domnumero 6, poste iru rekte. La grupo de la vendejeto ĉe “VKontakte”: <<http://vk.com/xodacevich>>. Nun en la vendejo estas reprezentitaj 22 Esperanto-librotitoloj, inkluzive vortarojn kaj lernolibrojn. Dum proksima tempo la kvanto de la titoloj pligrandiĝos. Feliĉan Novan Jaron!

Teamo de la eldonejo “Impeto”

ESPERANTLINGVA BONDEZIRO DE LA PAPO

La Papo Benedikto la 16-a post la Kristnaska mesaĝo *Urbi et Orbi* eldiris siajn bondezirojn en 65 lingvoj, inkluzive Esperanton. Li diris: “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!”. Samkiel dum la antaŭaj benoj, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en la placo Sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton “Esperanto”. La iniciato estis gvidata, kiel tradicie, de la itala samideano Giovanni Conti.

(informo kaj foto de <www.ikue.org>)



 kultura revuo

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 64-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 98-a Universala Kongreso en Rejkjaviko. Partopreno estas libera por ĉiuj. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo **Infanlibro**. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas la jenaj kondiĉoj:

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 × 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas “Luigi Minnaja”.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2012. Unu premio.

Ĉiujn konkursaĵojn en la branĉoj **Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo** oni devas sendi en unu papera ekzemplero al: ***Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italia***, aŭ prefere en elektronika formo al la adreso: <michela.lipari@tiscali.it>, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31-a de marto 2013**.

Por la Branĉo **Infanlibro** oni devas sendi kvar ekzemplerojn de la koncerna libro al la ĉi-supra adreso de s-ino Lipari, sekretario de la Belartaj Konkursoj.

Premioj: unua premio 250 eŭroj, dua premio 175 eŭroj, tria premio 100 eŭroj; nova talento 175 eŭroj; infanlibro de la jaro 525 eŭroj.

Laŭ decido de la Komitato de UEA la Belartaj Konkursoj ne plu havas la branĉojn pri filmoj kaj kantoj. Anstataŭe okazos festivalo de filmoj kaj festivalo de kantoj en gravaj estontaj aranĝoj de UEA/TEJO.

Detala regularo haveblas ĉe UEA kaj legeblas ankaŭ en la retejo de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Patric. Okcitanio

Unika artisto, Patric estas unu el la plej famaj okcitanlingvaj kantistoj, kun kantaro kiu miksas popularajn okcitanajn kantojn kun adaptaĵoj de eksterlandaj sukcesaj kaj liaj propraj komponaĵoj. Komence de sia kariero, li kantis kun Georges Brassens, Barbara, Claude Nougaro, Yves Duteil, Raimon, Pi de la Serra.

En UK en Montpellier (1998) Patric allogis la esperantistan publikon, kaj de-

novan fojon okaze de la Franca Nacia Kongreso (IREM) en 2011. Post tiu kongreso naskiĝis la ideo pri albumo en Esperanto enhavonta la kantojn de Patric tradikitajn en Esperanton de Andrt Andrieu, adaptitajn de Ludmila Novikova kaj eldonitajn en Rusio en broŝuro titolita “Okcitanaj kantoj en Esperanto”. La albumo “Okcitanio” prenas el la kantaro de Patric dek kvin titolojn aperintajn en liaj okcitanaj albumoj; temas pri populara kaj tradicia okcitana repertuaro kaj ankaŭ propraj komponaĵoj. Li akompanigas al si ĉiuoriginajn altkvalitajn muzikistojn en ĵazo, tradicia, roka, romaa, populara, salsa, monda muziko, ktp. La projekto efektiviĝis sub la arta direktado de JoMo (Jean-Marc Leclercq). La korusaĵoj estis registritaj de korusa grupo de geesperantistoj el Tuluzo kaj Arieĝo.

Okcitana kantisto Patric estas moderna trobadoro kiu vojaĝas tra la tuta mondo kun siaj kantoj. En 2013 li festos kvardek jarojn de kariero, sursceneja kaj diskara, kun jam dek ok albumoj, du DVD, kaj libro pri memoraĵoj kaj pensaĵoj. Hodiaŭ venas la vico de Esperanto per la apero de la albumo “Okcitanio” interpretita de Patric en la internacia lingvo. La albumo estas invito vojaĝi en Okcitanion; ĝi komenciĝas en la Suda Stacio, kie oni povas aŭdi la mediteraneajn lingvojn (italan, hispanan, okcitanan) en la rekantaĵoj. En la dek kvin kantoj miksiĝas tradiciaĵoj, personaj sentoj, koloroj, sonoj kaj etosoj de Okcitanio. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi: <<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd113&lng=e>>.

Vinilkosmo

Mikaelo Bronŝtejn. La antaŭlasta trajno

La nova disko de nia poeto, verkisto, bardo (kaj multo alia) enhavas 15 kantojn, kiuj ankoraŭ neniam aperis registrite sur liaj diskoj aŭ kasedoj: *Ĉe la Espero, Papilia aŭtuno, Virinoj kaj katoj, Elpensita amo, Adiaŭo, Vi estas la amo, Vivoj-ĉevaletoj, Malamiko mia, Kirlanta sorto, Diablidoj, kiuj sidas en ni, NIFO, Ĉetabla dialogo, Limerikoj, Tri-ĉapitra balado pri unu rastilo, Antaŭlasta trajno*. La disko estas registrita en Rigo kaj produktita en Moskvo. En la registrado partoprenis (per kunkantado en kelkaj kantoj kaj gitarado) Sergeo Straŝnenko.

Garik Kokolija
(Moskvo)



Ĵomart kaj Nataŝa. ĴomArtaĵoj-2 – La arĝenta albumo

La dua en la antaŭvidita serio de tri albumoj, “La arĝenta albumo” prezentas dek malnovajn kantojn komplete rearanĝitajn kaj reregistritajn, kaj du novajn. Ĉiuj kantoj estis registritaj inter 2011 kaj 2012. Ĵomart pli multe uzas sian propran gitar-ludan teknikon por pli bone ritmigi kaj aktualigi la kantaranojn. La registrado estas pure akustika, kun la intenco krei la saman intiman kaj varman etoson kiun ni sentas dum iliaj koncertoj.

Esperable la duopo sukcesos akiri sufiĉan monon por eldoni ĉi tiun albumon kiel kodiskon, ĝi estas jam aĉetebla per elŝuto de la platformo de Vinilkosmo: http://www.vinilkosmo-mp3.com/ĵomartajoj-arĝenta-albumo-c-76_133_197.html.

Ni esperas ke la kodisko povos aperi ne pli malfrue ol komence de 2013.

Vinilkosmo

REZULTOJ DE LA KONKURSO “VERDA PLUMO”

Karaj geamikoj,

ni ĝojas komuniki al vi, ke estis kalkulitaj la poentoj, kiujn dum la voĉdonado kadre de dua etapo de la konkurso ricevis la recenzoj pri la libroj de eldonejo Impeto, gajnintaj en la unua etapo.

Do, jen estas la gajnintoj:

La 1-a loko (16 voĉoj) estas aljuĝita al Vladimir Opletajev pro la recenzo “Ne nur lecionoj”. Li ricevos de la eldonejo “Impeto” 100 eŭrojn, diplomon kaj libro-premion.

La 2-a loko (12 voĉoj) estas aljuĝita al Jorge Camacho pro la recenzo “Malpretertempe”. Li ricevos de la eldonejo “Impeto” diplomon kaj libro-premion.

La 3-a loko (9 voĉoj) estas aljuĝita al Zdravko Seles pro la recenzo “Nova realismo de Mikaelo Bronŝtejn aŭ eta traktato pri leganto”. Li ricevos de la eldonejo Impeto diplomon kaj libro-premion.

Krome la honoran mencion de la organizantoj ricevas Klara Ilutoviĉ pro la recenzo “Pri “Esperanto kaj Vivo” de V.V.Samodaj”.

Gratulojn al la gajnintoj!

Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo)



Al la verkisto dediĉita

Somere nia urbo solene celebradis la jubileon de la fama rusa verkisto Ivan Gonĉarov, kiu naskiĝis en Simbirsk (nun Uljanovsk). En la kluba arĥivo estas gardataj kelkaj materialoj pri la verkisto kaj urbaj vidindaĵoj, ligitaj kun lia nomo. Ni proponas al la legantoj du el ili, fari-tajn de Sergeo Abramov kaj Olĵga Sirotinina. La vidindaĵojn fotis Olĵga Terentjeva, Ajgul Vildanova kaj Margarita Karceva.

IVAN GONĈAROV

Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov naskiĝis en Simbirsk la 6-an (18-an) de junio 1812 en familio de komercisto. Unuafoje li entreprenis la literaturan agadon dum universitataj jaroj, kaj la plej signifan sukceson donis al li tri famaj romanoj: “Ordinara historio”, “Oblomov” kaj “Krutaĵo”.

Nun la memoron pri tiu granda verkisto oni zorge gardas en lia patrio. La domo de Gonĉarov fariĝis muzeo, kiu konatigas siajn vizitantojn kun vivo de ĝia fama loĝanto, lia familio kaj liaj samtempuloj, ekzemple tie estas angulo de Oblomov kun nepra divano, ĥalato kaj araneaj retoj. La fama domo kun horloĝo, kiu ĉiam montras precizan tempon, iĝis simbolo de nia urbo. En Uljanovsk kaj Dimitrovgrad estas starigitaj monumentoj al Gonĉarov, kaj belforman laŭbon sur bordo de Volga oni konsideras kiel rendevulokon de liaj herooj. Liaj verkoj estas prezentataj en la Uljanovska drama teatro, kaj certe legataj kun granda intereso kaj plezuro.

Simbirsk estis patrio ne nur de la granda verkisto, sed ankaŭ de I.I.Oblomov – lia la plej populara heroo. L.N.Tolstoj rimarkis, ke ““Oblomov” havas sukceson ne hazardan... kaj ne efemeran”. Precipe en la urbo, kie loĝas ĝisnune sekvantoj, se ne posteuloj, de Ilja Iljiĉ. Multaj opinias, ke la vivo ŝanĝiĝas, ĝia progreso akceliĝas, la tempo de romantikaj pigrujoj delonge dronis en la eterna forgeso; do en moderna mondo, tumultema kaj impetega, ne estas loko por kontempla pigreco.

Kia sintrompo! Tiu loko ekzistas, kaj eĉ ne sola. “Oblomov-gardeno” estas la plej ŝatata promenadloko de pigru... pardonu, ripozantoj de la urbo. Kaj la plej bravaj ripozantoj atencas sanktaĵon. Bedaŭrinde la faman divanon de Oblomov en la muzeo de Gonĉarov licas nur rigardi, tamen



en la parko de Gonĉarov staras alia divano, pli granda, sur kiu eblas komforte sidi aŭ kuŝi. Oni povas ankaŭ almezuri pantoflojn de Oblomov por pli bone kompreni la karakteron de ilia fama mastro. Do, kial ne? Finfine en ĉiu moderna homo devas esti almenaŭ malgranda ero de romantika pigrulo. Ĉu vere?

Olĵa Sirotinina (Uljanovsk)

VINNOVKA

La bosko Vinnovskaja estas unu el la plej grandaj naturaj arbaraj kompleksoj de Uljanovsk. La bosko havas maljunegajn kverkojn kaj famas pro siaj akvofontoj. Pli frue la bosko nomiĝis Kindjakovskaja, ĉar ĝi apartenis al bienuloj Kindjakov-oj.

La 18-an de junio 1912 ĉe suda periferio de estinta vilaĝo Vinnovka (sur la loko, kie pli frue staris domo de Kindjakov-oj) honore al jarcenta jubileo de Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov, oni konstruis kaj solene malfermis memorlaŭbon. Ĝi memorigas pri vizitado (loĝado) de la verkisto en 1849 en la bieno de Kindjakov-oj, kie ĉe Gonĉarov aperis ideo de romano “Krutaĵo” (“Обрыв”). La monumento estis projektita de arkitekto Avgust Avgustoviĉ Ŝode laŭ mendo de bienulino E.M.Persi-Frenĉ. Ŝi estis la lasta el la familio de Kindjakov-oj.

Sub laŭba kupolo staras kvaredra obelisko kun bronza bareliefo de I.A.Gonĉarov kaj memortabulo. En 1967 pro terdeglito oni transportis la laŭbon sur monteton pli norde ol Vinnovka, ĉar la krutaĵo, famigita de Gonĉarov, dum la tempo transformiĝis al profunda ravino kaj proksimiĝis al la laŭbo. Ĉiujare la 18-an de junio oni aranĝas tie feston, dediĉitan al I.A.Gonĉarov. La 17-an de oktobro 2008 la laŭbo estis plene detruita. La 30-an de aprilo 2009 sur tiu loko la restaŭrita laŭbo estis solene reinaŭgurita.

Vinnovka estas bela ĉiusezone. La urbanoj ŝatas promeni tie ne nur printempe kaj somere. Ankaŭ vintre ili skias aŭ ĝuas frostan aeron. Tamen precipe bele aspektas la bosko aŭtune. Rigardu mem! Niaj E-klubanoj volonte promenas ĉi tie post kunveno en klubejo. Aliĝu!

Sergeo Abramov (Uljanovsk)



VITALIJ BIANKI

KIEL FORMIKETO HEJMEN RAPIDIS

Ekgrimpis Formiketo sur betulon. Atingis ĝi la pinton de la betulo kaj rigardis suben, kaj tie sur la tero ĝia kara formikejo apenaŭ videbla estis.

Formiketo eksidiĝis sur folion kaj pensas: «Iomete mi ripozu – kaj suben iru.»

La formikoj ja havas striktan leĝon: apenaŭ la suneto intencas subiri – ĉiuj kuras hejmen. Post la sunsubiro la formikoj ĉiujn enirejojn kaj elirejojn fermas kaj dormas. Kiu malfruis, tiu nokte restu ekstere.

La suno jam suben iris al la arbaro. Formiketo sidas sur la folio kaj pensas: «Nenio okazos, mi sukcesos hejmeniri; suben ja eblas pli rapide moviĝi».

Sed la folio estis malbona: flava, seka. Vento ekblovigis kaj forŝiris ĝin de la branĉo.

Flugas la folio trans arbaron, trans riveron, trans vilaĝon.

Flugas Formiketo sur la folio, balanciĝas – apenaŭ ne mortis pro timego. Alportis vento la folion sur la herbejon malantaŭ la vilaĝo kaj tie ĝin lasis. La folio falis sur ŝtonon, Formiketaj kruretoj kontuziĝis.

Kuŝas Formiko kaj pensas: «Pereis mia kapeto. Ne povas mi nun atingi la hejmon. La loko ĉirkaŭe estas ebena. Se estus mi sana – mi tuj ĝiskurus, tamen mal-feliĉo okazis – la kruroj malsanas. Tia domaĝo ke eĉ teron mi rodus.»

Rigardas Formiko: apud ĝi Raŭpo-Geometro kuŝas. Similas ĝi al vermo, tamen antaŭe estas piedetoj kaj malantaŭe estas piedetoj.

Formiketo diras al Geometro:

– Geometro, Geometro, forportu min hejmen. Miaj kruretoj malsanas.

– Ĉu eble vi mordos?

– Ne, mi ne mordos.

– Nu, bone, sidiĝu, mi vin alveturigos.

Formiketo surgrimpis la dorson de Geometro. Tiu kurbiĝis arke, la malantaŭajn piedojn almetis al la antaŭaj, la voston almetis al la kapo. Poste subite ĝi ekstaris plenstature kaj tuj kuŝis sur la teron kiel bastono. Mezuris ĝi sur la tero kiom da tiaj staturoj estas en ĝi kaj denove arke kurbiĝis. Do, iradis ĝi teron mezuri.

Formiketo jen flugas al la tero, jen al la ĉielo, jen kapinverse.

– Mi ne povas plu! – ĝi krias. – Haltu! Aŭ mi mordos.

Haltis Geometro, etendiĝis sur la tero. Formiketo subenrampis, apenaŭ spiris.

Ĉirkaŭrigardis Formiketo kaj vidas: antaŭe estas herbejo, sur la herbejo forfal-ĉita herbo kuŝas. Laŭ la herbejo Araneo-Herbfalĉulo paŝas: kruroj kvazaŭ stilzoj, inter la kruroj la kapo balanciĝas.

– Araneo, Araneo, forportu min hejmen! Miaj kruretoj malsanas!

– Do, sidiĝu, mi vin alveturigos.

Formiketo devis laŭ la aranea kruro suprenrampi ĝis genuo kaj de sur la genuo malsupreniĝi sur la dorson de Araneo: la genuoj de Herbfalĉulo elstaras pli alte ol la dorso.

Araneo komencis siajn stilzojn transloki – unu piedo estas tie ĉi, la alia estas tie, ĉiujn ok piedoj kvazaŭ spokoj en la okuloj de Formiketo preterkuradis. Araneo

ja iras ne rapide, per la ventraĉo strekas sur la tero. Tia veturado tedis al Formiketo. Ĝi apenaŭ ne mordis Araneon. Tamen subite, feliĉe, eliris ili glatan vojeton.

Haltis Araneo.

– Subenrampu, – diras Araneo. – Jen tie Karabo kuras, ĝi estas pli vigla ol mi. Formiketo subenrampis.

– Karabo, Karabo, forportu min hejmen! Miaj kruretoj malsanas.

– Sidiĝu, mi vin veturigis.

Apenaŭ sukcesis Formiketo surgrimpi la dorson de Karabo, ĝi tuj ekkuregis! Ĝiaj piedoj estas glataj kvazaŭ ĉevalaj.

Kuras la sespieda ĉevalo, kuras, ne skuas, kvazaŭ flugas.

Rapide alkuregis ili al terpoma kampo.

– Kaj nun derampu, – diras Karabo. – Ne por miaj piedoj estas la saltado laŭ la terpomaj bedoj. Prenu alian ĉevalon.

Formiketo devis derampii.

La terpomaj supraĵoj por Formiketo estas densa arbaro. Ĉi tie eĉ kun sanaj kuroj oni povas la tutan tagon kuri. Kaj la suno jam estas malalte.

Subite aŭdas Formiketo ke iu pepas.

– Ek, Formiketo, surgrimpu mian dorson, ni eksaltu!

Sin turnis Formiketo – apude staras Skarabeto-Pululo apenaŭ videbla sur la tero.

– Ho, vi estas tro malgranda! Vi ne povas min levi.

– Sed ĉu vi estas granda?! Grimpu, kiel mi diris.

Iamaniere Formiketo lokiĝis sur la dorso de Pululo. Apenaŭ la piedetojn ĝi starigis.

– Ĉu vi surgrimpis?

– Nu, jes.

– Se jes, do tenu sin firme!

Pululo levis sub sin siajn dikajn malantaŭajn kruretojn, – kaj ili estas kvazaŭ faldeblaj risortetoj, kaj – klak! – ĝi rektigis ilin. Momenton, kaj ĝi jam sidas sur la bedo. Klak! – sur alia bedo. Klak! – sur tria bedo.

Tiamaniere la tutan legomĝardenon ĝis barilo ĝi forklakis.

Formiketo demandas:

– Ĉu vi povas trans la barilon?

– Trans la barilon mi ne povas: ĝi estas tre alta. Petu Lokuston: ĝi helpos al vi.

– Lokusto, Lokusto, forportu min hejmen! Miaj kruretoj malsanas.

– Sidiĝu sur la kolon.

Sidiĝis Formiketo sur la kolon de Lokusto.

Lokusto kunmetis siajn longajn malantaŭajn kurojn poduone, poste tuj rektigis ilin kaj suprensaltis alte en la aeron samkiel Pululo. Sed subite kun krako malkovriĝis la flugiloj malantaŭ ĝia dorso, transportis Lokuston trans la barilon kaj senbrue mallevis ĝin sur la teron.

– Halt’! – diris Lokusto. – Ni alvenis.

Formiketo rigardas antaŭen, kaj tie estas rivero: se eĉ tutan jaron naĝi en ĝi, ne eblas transnaĝi.

Kaj la suno jam estas pli malalte.

Lokusto diras:

– Trans la riveron eĉ mi ne povas transsalti. Ĝi estas tro larĝa. Atendu iomete, mi Akvokurulon vokos: ĝi estos via boatisto.

Ekkakis Lokusto en sia maniero, kaj subite ekkuris sur la akvo boateto sur piedetoj.

Ĝi alkuris. Ne, ĝi estas ne boateto, sed Akvokurulo-Cimo.

– Akvokurulo, Akvokurulo, forportu min hejmen! Miaj kruretoj malsanas.

– Bone, sidiĝu, mi transveturigis vin.

Sidiĝis Formiketo. Akvokurulo eksaltis kaj ekpaŝis sur la akvo, kvazaŭ sur la seka tero.

Kaj la suno jam tre malalte estas.

– Karuleto, pli rapide! – petas Formiketo. – Oni min hejmen ne enlasos.

– Mi povas eĉ pli rapide, – diras Akvokurulo.

Kaj tuj ekkuregis ĝi! Forpuŝas, forpuŝas ĝi sin per siaj kruretoj kaj rulglitas laŭ la akvo kvazaŭ laŭ glacio. Tre rapide ili trovis sin sur la alia bordo.

– Ĉu vi sur la tero kuri povas? – demandas Formiketo.

– Estas malfacile por mi kuri sur la tero, ĉar miaj piedoj ne glitas tie. Jen, rigardu: arbaro videblas. Serĉu por vi alian ĉevalon.

Rigardis Formiketo antaŭen kaj vidas: staras super la rivero alta arbaro, ĝis la ĉielo mem. Kaj la suno jam kaŝis malantaŭ ĝi. Ne, ne sukcesos trafi hejmen Formiketo!

– Rigardu, – diras Akvokurulo, – jen por vi la ĉevalo rampas.

Formiketo vidas: preterrampas Maja Melolonto – peza, malgracia skarabo. Ĉu oni povas malproksimen forgalopi sur tia ĉevalo? Tamen ĝi obeis Akvokurulon.

– Melolonto, Melolonto, transportu min hejmen. Miaj kruretoj malsanas.

– Kie do vi loĝas?

– En la formikejo malantaŭ la arbaro.

– Sufiĉe malproksime... Kion do ni faru? Sidiĝu, mi alveturigis vin.

Ekrampis Formiketo laŭ la malmola flanko de Skarabo.

– Ĉu vi sidiĝis do?

– Sidiĝis.

– Kien do vi sidiĝis?

– Sur la dorson.

– He, stultulo! Rampu sur la kapon!

Ekrampis Formiketo sur la kapon de Skarabo. Bone ja, ke ĝi ne restis sur la dorso: dispecigis Skarabo la dorson duone, du malmolajn flugilojn levis. La flugiloj de Skarabo estas kvazaŭ du renversitaj trogoj, kaj el sub ili aliaj flugiletoj kreskas, malvolviĝas: maldiketaj, diafanaj, pli larĝaj kaj pli longaj ol la supraj.

Komencis Skarabo spiregi, pufiĝi: «Uf! Uf! Uf!». Kvazaŭ ĝi motoron ekfunkciigas.

– Oĉjo, – petas Formiketo, – pli rapidu! Karuleto, pli viglu!

Nenion respondas Skarabo, nur spiregas: «Uf! Uf! Uf!»

Subite ektremetis la maldikaj flugiletoj, ekfunkciis. «Zum! Frap-frap-frap!» –

Melolonto leviĝis en la aeron. Kvazaŭ ŝtopilon elĵetis ĝin la vento supren – pli alte ol la arbaro.

Formiketo de supre vidas: la suneto jam per sia rando teron tuŝetis.

Kiam ekkuregis Melolonto, eĉ la spiro de Formiketo preskaŭ haltis.

«Zum! Frap-frap-frap!» flugegas Skarabo, boras la aeron kvazaŭ kuglo.

Fulmetis sube la arbaro – tuj malaperis la arbaro.

Jen estas la konata betulo kaj la formikejo sub ĝi.

Super la supro de la betulo elŝaltis Skarabo sian motoron kaj – frap! – eksidiĝis sur la branĉegon.

– Oĉjo, karuleto! – ekpetegis Formiketo. – Kiel mi la teron atingos? Miaj kruretoj ja malsanas, kaj mi povas la kolon rompi.

Skarabo kunmetis la maldikajn flugiletojn laŭ la dorso. De supre ĝi kovretis ilin per la malmolaj trogetoj. La pintojn de la maldikaj flugiloj ĝi sub la trogetojn akurate forigis.

Pripensis ion kaj diras:

– Do, kiel vi malsupreniĝos mi ne scias. Mi ne flugos al la formikejo: tre dolore vi, formikoj, pikas. Atingu ĝin mem kiel vi povas.

Rigardis Formiketo suben, kaj tie sub la betulo estas ĝia kara hejmo.

Rigardis ĝi al la suneto: ĝi jam duone kaŝis sin malantaŭ teron.

Rigardis ĝi ĉirkaŭ si: branĉegoj kaj folioj, folioj kaj branĉegoj.

Ne sukcesos Formiketo hejmen, eĉ se ĝi ĵetus sin kapinverse.

Subite vidas ĝi: apud ĝi sur folio Raŭpo Tortriko sidas, silkan fadenon el si tiras, tiras kaj ĉirkaŭ la branĉo volvas.

– Raŭpo, Raŭpo, malsuprenigu min hejmen! Lasta minuteto restas por mi, alie ne enlasos oni min hejmen nokte.

– Lasu min en trankvilo! Ĉu ne vidas ke mi estas okupita: ŝpinaĵon ŝpinas.

– Ĉiuj kompatis min, neniuj forpelis, vi estas la unua!

Ne povis deteni sin Formiketo, ĵetis sin sur ĝin kaj tuj ekpikis ĝin!

Ektimiĝinte Raŭpo la kruretojn subfleksis kaj kaprioje de sur la folio ekflugis suben.

Formiketo ja pendas sur ĝi – firme enkroĉiĝis. Sed nelonge ili falis: io supre ilin – tir’!

Kaj ekbalanciĝis ili ambaŭ sur silka fadeneto: la fadeneto ja estis volvita ĉirkaŭ la branĉo.

Balanciĝas Formiketo sur Tortriko kvazaŭ sur balancilo, kaj la fadeno fariĝas pli longa, longa, longa: elvolviĝas ĝi el la ventreto de Tortriko, tiriĝas, ne ŝiriĝas. Formiketo kune kun Tortriko malsupreniĝas pli malalte, pli malalte.

Sube jam en la formikejo la formikoj klopodas, rapidas, enirejojn kaj elirejojn fermas.

Ĉion ili fermis – nur unu, la lasta enirejo restis. Formiketo de sur Raŭpo kaprioje kaj hejmen impetis!

Post tio ankaŭ la suneto subiris.

tradukis Larisa Kuzmenko (N.Tagil)

Rustam Karapetjan (Krasnojarsk)

* * *

Drolaj muzikistoj iras el Bremeno,
Drolaj muzikistoj kantas pri la mond'
Kaj serpentas foren de la voj' fadeno,
Vagabondojn logas ruĝa horizont'.
Preter pinoj-muroj sub ĉiel-tegmento
Hastas kaj grincetas malnoveta ĉar'.
Kisas muzikistojn inspirita vento,
Kaj subkantas ete roĝo kaj arbar'.
Super placo flugas pri la am' kanzono,
La azeno dormas en proksima stal',
Kaj princino ploras sur palac-balkono,
Atendante belan princon sur ĉeval'.

* * *

Rampas memoro kiel helik',
Hastas ĝi trans horizonton.
Kaj kiam paĉjo estis kun ni –
Estis pli granda la Mondo.

Estis pli suka de l' Suno kolor'
Kaj pli senbridaj – festoj.
Jen kiam paĉjo vivis ankoraŭ –
Panjo pli gaja estis.

Kiom da jaroj pasis sen spur',
Sed por memoro – nur spano.
Foto ridetas de sur blanka mur':
Mi apud paĉjo kun panjo.

* * *

Kiam trajn' al horizonto plonĝos,
En animo tristo tuj ekloĝos.
Ĉar kun trajno forveturos revoj,
Vi ja restos sur stacio "Devo".

Via servo estas – adiaŭo,
Jen forpasas trajn' de hodiaŭo.
Sur perono penas blovorkestro,
Ploras amatin' en trajn-fenestro.

REZULTOJ DE INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO "HRISTO GOROV"

POEZIO

Unua premio: "Belega naturo" kaj
"Klandestina pasaĝero" (Arlain
Kizeyidioko Mayinda, Kongo)

Dua premio: "Per Esperanto" (D-rino
Penka Bojaĝieva, Bulgario)

Tria premio: "Por Henry" (Keneĉjo
Goldbergo, Usono)

PROZO

Unua premio: "Aŭtuna tago" kaj
"Rubajoj" (Lenke Szasz, Rumanio)

Dua premio: "La lumo" (Elena Popova,
Bulgario)

ARTIKOLO

Unua premio: "Li estis la unua" (Ana-
tolo Sidorov, Rusio)

Dua premio: "La granda revo de Ivan
Ivanov" (Vladimir Ĵelev, Bulgario)

Tria premio: "La neripetebla nacia Es-
peranto-Kongreso" (Georgo Miĥa-
jlov, Bulgario)

* * *

Sur pavimo vila hundo ploras,
Ĉar turmentas hundon tristo kora.
Ĉar la mastro ĝia ne revenas...
Kaj la hundo ĉe pordeg' havena
Plu atendas mastron. Plu atentos.
Sur okuloj larme tremas plendo,
Preterpasas homoj, flugas aŭtoj.
Pli doloraj iĝis koraj batoj.
En orelojn flustras sala brizo:
“Ĉiuj hundoj trafas paradizon,
Kie vere apud vojo astra
Jam atendas vin amata mastro”.

* * *

Mi kredas: spite kataklismojn
Ordiĝos nia fer-epok'.
Forgesu pri apokalipsoj!
Sed... kiel skribi “Ragnarok”?

* * *

En oceano, kie sirenoj kantas,
Jaro post jaro ŝipo navigas lanta.

Vel' ĉifoniĝis, likas de ŝip' kareno,
Trovi ne povas vojon ĝi al haveno.

Dancas laŭ ond' delfenoj, kriegas laroj.
Fluas de sun' mielo al vir' grizhara.

Li al gepatraj bordoj memoras vojon,
Sed ne permesas hejmen reveni Trojo.

Multe da jaroj, kiujn forprenis Diablo,
Multe da sango sorbis avida sablo.

Vento sopiras. Plaŭdas de laroj krioj.
Timas la viro: atendas lin jam neniu.

BORIS NATANOVIĈ STRUGACKIJ

La 19-an de novembro en hospitalo de Sankt-Peterburg forpasis Boris Natano-
viĉ Strugackij. Klasikulo de la rusa Literaturo (mi opinias, ke ne nur scienc-fikcia),
Boris Strugackij faris netrotakseblan servon al Esperanto – kaj per la eldonpermeso
por la tradukitaj verkoj de la fratoj Strugackij, kaj per multfoje prezentita pozitiva
opinio pri la lingvo. Por lia 80-jariĝo, kiun li estus atingonta en aprilo 2013, estis



planita speciala gratullibro en Esperanto. Ĝi do devas esti finfarita – kiel memorlibro. Lia forpaso estas tre dolora por mi, ĉar mi perdis la konaton, kiu multfoje dum mal-facilaj tagoj de mia vivo helpis min per konsolo kaj konsilo. Pacon al via animo, Boris Natanoviĉ.

*Mikaelo Bronŝtejn
(Tihvin)*

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalĵi) – ANTAŬ LA NOVJARO

- 1 -

Blizardo hurlegu,
Kaj frosto bonregu,
Kaj neĝ' kuŝu vaste sur ter'!
La jaro impona,
Belvesta, ĝojdona
Avenu kun hela esper'!

Bonkoraj deziroj,
Gratuloj, inspiroj
Donacu al ĉiu anim'
La bonon en ĉio,
Sen ies envio,
Sen premo, doloro kaj tim'!
La festo proksimas,
Kaj neĝ' gaje glimas,
Ridetas al neĝo stelar'.
Solenu la festo
Je ĝoja tempesto
Renkonte al la Nova jar'!



- 2 -

Serpento pretas protekti
La novan jaron laŭmite.
Ĉu taŭgas tia zorgulo
Defendi dum tuta jar'
Kaj ĝustatempe korekti
Erarojn devinspire
Dum vagoj en vivnebulo
Jam ekde la januar'?

Kaj kiel jartalismano
Laŭ kred', amuz' aŭ deliro
Ĉu vivu ia serpento
En la popola anim'?'
Por pac', amikoj kaj sano,
Por justaj faro kaj diro
Ĉu helpas nuna atento
Al la malnova kutim'?



Forgesu ni pri serpento –
Ĝi lasu l' jaron en paco!
La jaro estu favora
Al ni dum ĉiu sezon'!
Saluton, frosto kaj vento,
Foriru nuboj de laco,
En vintra kanto sonora
Venigu l' jaro al bon'!

😊 AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ 😊

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo:

Centa Ameriko (anst. Centra)

fiŝkaprado (anst. fiŝkaptado)

miksaĝo (anst. miksaĵo)

oksidente (anst. okcidente)

patroprenis (anst. partoprenis)

tejo tutmone (anst. tutmonde)



FELIĈAN

NOVAN

JARON

AL ĈIUJ!